

Boletín

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

XXXIV^o

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



Dum la ekskurso tra «Ruta Juan de Austria»

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Director:

Domingo Martínez Benavente

Redacción y Administración:

Inés Gastón

Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
ZARAGOZA

ADRESOJ

Federación Española de Esperanto
(Hispana Esperanto-Federacio)
Oficina Central:

Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Prezidanto:

S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16

Sekretario:

S-ro José M.ª González Aboín
Oficina Central:
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Kasisto:

S-ro Gerardo Flores Martín
Str. Presidente Carmona, 2
MADRID-20

Ĉekkonto: N.º 8362-271
Banco Español de Crédito
Str. Diego de León, 54
MADRID-6

Libroservo:

Federación Española de Espe-
ranto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Informa-servo:

Federación Española de Espe-
ranto, O. C.
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º, des. 7
MADRID-15

Eldona Fakoj:

F-ino Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
Ĉekkonto: N.º 17917, Bc. Bilbao
Coso, 31
ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 180 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie pu-
blikigitaj ne reprezentas la oficialan
opinion de H.E.F., escepte en okazo
de oficiala komunikoj; ĝi ankaŭ ne
reprezentas la opinion de la Redak-
toro; do, pri la artikoloj responde-
cas la aŭtoroj mem.

de Secretaría

DONANTES DEL FONDO DE ADQUI-
SICION DEL LOCAL EN PROPIEDAD
(F.A.L.P.)

	Pesetas
Suma anterior	309.625,—
Paco kaj Amo	500,—
J. M. Piquero Muñiz	500,—
Marina Piquero	500,—
Antonio Ribeiro (500 escu- dos)	1.100,—
Clementina Tranque	500,—
Antonio Gamboa	10.000,—
Bilbao-a HEF-membro	500,—
Gerardo Flores	5.000,—

Total 328.225,—

Madrid, 29 de septiembre de 1974.

Gerardo Flores

Tesorero de H.E.F.

NUEVO DUMVIVA MEMBRO DE HEF
N.º 13. Luis Hernández García (núme-
ro 1.757).

deziras korespondi

RUMANUJO. — Brasov, Mircea cel
Batrah HRº 39 Slok 51, ap. 26, S-ro
Ștefan Minai deziras korespondi kun
hispanaj esperantist(in)o.

ĈEHOSLOVAKUJO. — okr. B. Bustri-
ca, Tajch 19, 97651 Horná Lehota,
S-ro A. Gombaszögi deziras kores-
pondi kun hispanaj esperantistoj.

HISPANUJO. — Badalona (Barcelona),
str. Nápoles, n.º 27-2.º-3.ª, S-ro. Gus-
tavo O. Cifrián deziras korespondi
kun esperantistoj el diversaj landoj.

HISPANUJO. — Las Palmas de Gran
Canaria, str. León y Castillo, n.º 359,
viv. 12, S-ro. Manuel Rodríguez Sán-
chez deziras korespondi kun esperan-
tistoj el diversaj landoj.

HUNGARUJO. — 4026 Debrecen, Hat-
van u.I.VIII.LH.II.2, Fino. Tarcsai
Katalin deziras korespondi kun his-
panaj esperantistoj.

ĈEKOSLOVAKUJO. — 79845 Suchdol,
u. Prostějora, S-ro. Motálek Bedvich
deziras korespondi kun hispanaj es-
perantistoj.

Anoncetojn kies adreso ne estas
klare skribita, mi ne aperigas. Do bon-
volu skribi preslitere aŭ tajpe.

Okazis la XXXIV.^a Hispana Kongreso de Esperanto. De la 18^a ĝis la 23^a de julio, ĉirkaŭ 300 esperantistoj alvenintaj de ĉiuj latitudoj de la Duoninsulo, kunvenis en Valladolid. Verdire, la kongreso okazis de la 18^a ĝis la 22^a, sed, kiel postkongresa ekskurso, la 23-an, invitive de la Provinca Konsilantaro, la kongresanoj ĝuis tre interesan ekskurson tra la "Ruta Juan de Austria".

Ĵaŭdon, 18-an

La Akceptejo funkciis en la sidejo de la Esperanto-Grupo de Valladolid, kiu ludis la rolon de Kongresejo kvankam la ĉefaj aranĝoj okazis en diversaj gravaj salonoj sufiĉe proksimaj unu de la alia. Tiamaniere la LKK klopodis informi kiel eble efike la eksteran publikon pri la Internacia Lingvo kaj la Kongreso.

Dum la tuta tago membroj de la LKK kaj helpantoj deĵoris en la Kongresejo kie oni liveris la dokumentojn kaj kie ankaŭ funkciis la libroservo.

Je la 18^a okazis kunveno de HEJS kaj je la 23^a en la Salono "Landó Club" okazis la Junulara Balo kaj elekto de "Fraŭlino Esperanto"; la decido trafis

nian samideaninon Carmela Palacios, de Bilbao, kiu gajnis la balotadon pro sia beleco kaj simpatio, kaj kompreneble, pro sia esperantisteco. La festo daŭris ĝis tre malfrue kaj la partoprenintoj ĝuis tre amuzan etoson.


Vendredon, la 19-an

Je la 10^a ĉiuj kolektiĝis en la preĝejo "Nia Sinjorino de la Paco" por partopreni la Meson en Esperanto. Celebris kaj predikis en la Internacia Lingvo, Pastro Jonás Castro.

Je la 12^a en Salono Borja okazis la Solena Malfermo de la Kongreso. Prezidis Lia Ekscelenco Sro. José Estévez Méndez, Provincestro de Valladolid, akompanis lin ĉe la prezida tablo la Vicurbestro Moŝto Sro. Emilio Martín Calero; la Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Sro. Angel Figuerola Auque; la Provinca Delegito de la Ministerio pri Informado kaj Turismo, Sro. Carmelo Romero Andrés; la Provinca Delegito de la Ministerio pri Edukado kaj Sciencoj, Sro. Manuel López Rodríguez; la Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, Sro. Mariano Cantalapiedra Nieto, kaj ceteraj membroj



Post la Mezo, Liaj Moŝtoj la Provincestro, la Policestro kaj la Provinca Delegito de la Ministerio pri Edukado kaj Sciencoj babilas kun la kongresanoj.



La Prezidantaro dum la Solena Inaŭguro.

de la estraro de H.E.F. kaj de la L.K.K.

Kiel sekretario funkciis la sekretario de la Hispana Esperanto-Federacio, Sro. González Aboín.

La Prezidanto de la LKK per tre afablaj kaj simpatiaj vortoj, bonvenigis la kongresanojn kaj deziris plenan sukceson al la Kongreso kaj agrablan restadon al ĉiuj.

La Sekretario legis kelkajn ricevitaĵajn salutojn. Sekvis la salutoj de eksterlandaj samideanoj, Sro. Freitas el Portugalujo invitis al partopreno en la venontjara Kongreso de Esperanto en sia lando. Tuj sekve salutis la reprezentantoj de Sekcioj kaj Grupoj aliĝintaj al Hispana Esperanto-Federacio. Fermis tiun vicon da salutoj Roberto Canet Castelló, ĉarma infano, kiu per flua kaj bone prononcata Esperanto, salutis nome de la Esperanton parolantaj infanoj en Hispanujo. Tondran aplaŭdodon li aŭskultis je la fino.

La Prezidanto de H.E.F., Sro. Angel Figuerola Auque faris la inaŭguran paroladon.

Unue li dankis al ĉiuj aŭtoritatuloj la honoron, kiun ili faris al nia Kongreso per siaj prestiĝaj nomoj en la Honora Komitato, kaj kiun ili faras nun ĉeestante persone aŭ per reprezentanto en nia Solena Inaŭguro. Poste

li esprimis sian ĝojon pro la fakto ke ni denove kongresas en Valladolid. Li resumis la belecon kaj intereson de la



Rodolfo Canet Castelló salutis la Kongreson.

urbo rilate al historio, arto kaj kulturo, kio kune kun la grava kaj moderna industrio konsistigas la nuntempan progresigan urbon, kiu nin gastigas.

Dum sia parolado, nia Prezidanto reliefigis la gravecon de la disvastigo de Esperanto kiel internacia lingvo, nura solvo por la lingva problemo.

Sekvis kuraĝigaj vortoj de Lia Ekscelenco Sro. José Estévez Méndez, kiu per sincera esperantisteca paroladeto esprimis sian konfidon al la Esperanta Movado, aŭgurante al ĝi plenan sukceson. Fine, li deklaris inaŭgurita la Kongreson.

Ĉiuj parolintoj estis varme aplaŭditaj. Per kantado de "La Espero" finiĝis la solenaĵo.

Je la 16^a, en salono de la Populara Sparkaso, okazis laborkunsido de la Estraro de H.E.F. kun la delegitoj de Sekcioj kaj Grupoj. Dum la kunsido oni studis kaj detale pritraktis ĉiujn punktojn de la tagordo por la Ĝenerala Kunveno de la Hispana Esperanto-Federacio, kaj ceterajn proponojn de la kunsidantoj kaj de aliaj federacianoj, kiuj sendis ilin skribe. Ĉar estis pluraj la proponoj ricevitaj, la kunsido daŭris ĝis la 19,45^a. Intertempe en apartaj salonoj okazis fakaj kunvenoj kaj labor-kunsidoj.

Je la 20^a prelegis en Esperanto Sro. José M.^o González Aboín pri la temo: "Evoluo de la lingvo Esperanto". La preleganto prezentis detalan studon de la Internacia Lingvo de ĝia komenco ĝis la nuntempo. La aŭskultantoj




S-ro José María González Aboín, sekretario de H.E.F., ĉijara kongresa preleganto en Esperanto.

aplaŭdis je la fino. La prelego okazis en salono de la Provinca Sparkaso.

Fermis la programon de tiu tago rava koncerto en Salono Borja. "Coral Vallisoletana", kiun direktas Majstro Carlos Barrasa, estas trupo de sesdeko da gekantistoj, kiuj tuj mirigis nin pro la agordeco kaj harmonieco de siaj voĉoj. La kantado estis ekzakta en sia beleco; unu kanzono sekvis la alian ĉiam pli kaj pli precize kaj alloge kaj je la fino ili kantis nian himnon en Esperanto. Tondra aplaŭdado premiis la laboron de "Coral Vallisoletana".

Sabaton, la 20-an

Je la 9^a okazis turisma rondveturo tra la urbo kun vizito al plej gravaj vidindaĵoj: Katedralo, Muzeo, Universitato... mi ne citas ĉiujn ĉar mi neniam finos; Valladolid estas vera juvelo de plej artaj trezoroj. La vizito daŭris ĝis posttagmeze.



Parto de la kongresanoj antaŭ la «Casa de Colón» okaze de la vizito tra la urbo.



Jus elirinte de la Muzeo, kongresanoj komentas la viziton.

Je la 17^a, en la Kongresejo okazis la kutima ekzamenado. Multaj gesamideanoj volis trapasi la provon. Aparte oni informos pri la rezulto.

Je la 16^a en salono de la Populara Sparkaso okazis informna kunsido pri la Universala Esperanto-Asocio. Ĝin prezidis la Delegito de UEA en Valladolid, Sro. Antonio Gamboa.

Sro. Ramón Jiménez, de Barcelona salutis la kunsidantojn nome de la Cefdelegito de U.E.A. en Hispanujo, Sro. Luis Hernández Izal.

Pro neebla ĉeesto de la Prezidanto de H.E.F., Fino. Inés Gastón informis pri la konsisto de U.E.A. kaj ĝia funkciado. Kaj, ankaŭ pri la kampanjo de insidoj, mensogoj kaj kalumnioj fare de grupo apartenanta al difinita politika partio en interkonsento kun la estraro de TEJO por faliĝi Dron. Lapenna de la Prezidanteco de la Asocio, ĉar li defendas la neŭtralecon en U.E.A., kio ne interesas al tiu partio nek al la gvidantoj de TEJO kaj ceteraj intrigantoj. Sekvis tre vigla forumo, kaj ĉiuj konsentis ke neŭtraleco estas nepre bazo por Universala Esperanto-Asocio kaj Dro. Lapenna la neanstataŭebla Prezidanto de la Universala Asocio pro sia kapablo, prestiĝo kaj sindediĉo.

Je la 20^a, Dro. Fernando de la Puente prelegis en la hispana lingvo pri "Esperanto y el compromiso temporal".

Li komencis sian disertacion per prezentado de kio estas aŭ kio devas esti —laŭ lia opinio— Esperanto, kaj kio estas aŭ kio devas esti —ankaŭ laŭ lia

opinio— la portempa kompromiso. Por tio, li difinas Esperanton, ne nur kiel simpla, neŭtrala lingvo internacia kiu faciligas la interkomprenigon de ĉiuj homoj, sed kiel portanto de la viviga spirito, —de ni nomata interna ideo— kiun ĝia kreinto Dro. Zamenhof inspiris, por ke ĝi estu perilo de paco kaj amo inter ĉiuj homoj.

Rilate la portempan kompromison li ĝin difinas kiel seriozan kompromison por atingi la rangaltiĝon de la mondo, laborante ĉiu laŭ siaj eblecoj ĝis atingi ke la homo estu liberigita de ĉio, kio reprezentas malpligon de liaj digno kaj libereco.

En la pratempo, —li diris— la kristanoj sekvis vertikalan linion rilate al Dio, ili serĉis nur sian personan savon. Post la II^a Vatikana Koncilio aperas la mankanta horizontala linio nepre necesa, por kune kun tiu vertikala formi la krucon, signalon de la kristano. Tiu horizontala



D-ro de la Puente, prezidanto de H.E.H.A., ĉijara preleganto en hispana lingvo.

linio konsistas el amo al aliulo, frato nia, pri kiu ni devas interesiĝi kaj kies problemojn ni devas kunvivi. Ĉi tiu kristana laboro plene koincidas kun la vojo signita de Dro. Zamenhof; kristanoj kaj esperantistoj devas kune trairi ĉi tiun vojon.

Unu el niaj ĉefaj taskoj —li diras— estas promocii la Justicon en la mondo, laborante laŭ niaj eblecoj por korekti la maljustaĵojn. Tuj sekve, la preleganto prezentas sian opinion kontraŭ perforto, pri kiu li diras ke ĝi ne estas kristana nek esperantista, ĉar perforto generas malamon, kaj same Esperanto kiel Kristanismo baziĝas sur amo.

Li kulpas pri la konstanta skalado de perforto la nuntempan vivon; ĉio en la mondo (kino, televido, ĵurnalaro, eĉ infanaj revuoj kaj ludiloj) estas senĉesa semo al perforto.

Nuntempe, —li diras— oni parolas pri ŝanĝo de strukturoj pro ĝia maljusteco, kaj mi min demandas ĉu la strukturoj malbonigas la homon aŭ ĉu la homo maljustigas la strukturojn. La sperto lernigas nin, ke ŝanĝoj en la strukturoj, se ne ekzistas samtempaj mensaj ŝanĝoj en la homo nur kaŭzas novajn maljustaĵojn.

Fine li studas la diversajn homajn malvirtojn, kiuj kaŭzas maljustaĵojn kaj kiuj nepre, oni devas korekti, kaj li mencias kelkajn el ili: Troa deziro de profito; monavideca spirito; starigi kiel absolutajn valorojn, komforton, egoismon kaj lukson; vantemo pri posedo de objektoj elmontrantaj riĉecon kaj povon; malbonuzo de privata posedaĵo kiu devas esti je la servo de la komunumo per tantiemo en la entrepreno al administrantoj, teknikistoj kaj laboristoj; ambicio pri rego kaj trouzo de povo; ekspluatado de enmigrintaj laboristoj, de malfortuloj, malriĉuloj kaj malkleruloj; sin profiti de influoj kaj rekomendoj, malvirto malfacile forigebla; malestimo al la homa vivo (mortpuno, legalizita aborto, sekvestroj, terorismo, ktp.); supereco de la armilaj elspezoj super tiuj kontraŭ malsato, ktp. Por korekti tiujn malvirtojn oni devas komenci de ni mem, unue, ne sekvante la facilan vojon lasi ke estu la aliaj kiuj sin plibonigu kaj laboru. Kaj, poste, semante ĉi tiujn principojn, kune kun la homarama spirito de Zamenhof, kiun enhavas la "interna ideo". Kaj, kiam la homo ne plu estu


lupo por la homo kaj li interesiĝos pli pri aliulo ol pri si mem, tiam estos tempo por starigo de ekonomiaj, sociaj kaj politikaj strukturoj justaj kaj liberigaj de ĉies sklaveco materiala kaj morala, kio ebligos ke Justico, Vero, Libereco, Paco kaj Amo regos en la mondo.

Tondran aplaŭdadon li aŭskultis je la fino, kaj li devis respondi plurajn demandojn de la ĉestantoj.


Dimanĉon, la 21-an

Tuttaga ekskurso al Salamanca. La aŭtobusoj startis je la 9^a por alveni al Salamanca je la 10,30^a. Tie nin atendis niaj samideanoj gesinjoroj Gastón.

Jus alveninte ni kolektiĝis en la "Clerecía", unu el la plej belaj monumentoj de ĉi tiu arta urbo. Ĝia konstruado komenciĝis en 1617 kaj finiĝis en 1750. En ĝia preĝejo okazis la Meso en Esperanto; ĝin celebris kaj predikis en la Internacia Lingvo, Pastro Jonás Castro. La nombra publiko havis okazon konstati ke Esperanto estas praktika, vivanta lingvo.



Grupeto da kongresanoj antaŭ la Katedralo de Salamanca.



Jus alveninte al Salamanca, kelkaj ekskursantoj pozas por «Boletín» antaŭ la pordo de la «Clerecía».

Antaŭ la tagmanĝo ni vizitis la urbon; mi ne parolos pri ĝia beleco kaj intereso ĉar en la antaŭa numero de BOLETIN aperis artikoleto pri ĝi. Krome, Salamanca estas mondkonata urbo.

Je la 5^a posttagmeze, per aŭtobusoj ni veturis al Rodasviejas kie okazis la

“fiesta campera”. La alveno de la taŭridoj en ĉi tiu okazo, sed taŭroj en aliaj, estas laŭ mia plaĉo la plej bela parto de tiaj festoj kvankam ĝenerale, ili ĉiam estas gajaj kaj amuzaj. Dum la festo niaj gesamideanoj povis elprovisian kuraĝon kaj arton antaŭ la besto, kompreneble ne mortigante ĝin. Estis jam la 9^a vespere kiam ni reveturis



Lia Moŝto la Urbestro de Valladolid, S-ro Hernández Díez salutas la kongresanojn okaze de la Oficiala Akcepto.



La kongresanoj atente aŭskultas la salutvortojn de Lia Urbestra Moŝto.

al Valladolid ĝuinte tre belan kaj agrablajn ekskurson.

London, la 22-an

Je la 9^a, per aŭtobusoj ni iris al fabrikoj "IPAVASA", "NICA" kaj "CRUZ BLANCA". Tre interesa estis la vizito al tiuj fabrikoj, kie tre afable akceptis nin kaj montris al ni la diversajn halojn kie okazas la fabrikado de la koncernaj produktoj; teknikistoj klarigis al ni la funkciadon de la maŝinoj kaj evoluon de la produktoj. Post la vizitoj oni regalis nin per bombonoj kaj kajeretoj kun bulkraĵonoj en la unua; alumetoj kaj saketoj kun produktaĵo de la fabriko (nitrogena sterko) en la dua kaj per biero kaj manĝetoj en la lasta.

Je la 13,30^a okazis la Oficiala Akcepto en la Urbodomo. En la nomo de la Urbo bonvenigis nin Lia Moŝto la Urbestro Sro. Julio Hernández Díez; per tre simpatiaj vortoj, li deziris al ni feliĉan restadon en Valladolid, kaj sukcesplenan Kongreson. Respondis al la Urbestra Moŝto la Prezidanto de H.E.F., kiu dankis la afablecon de ĉiuj kaj dediĉis afablajn vortojn al la urbo. Tuj sekve la Magistrato de Valladolid regalis nin per lunĉo.

Je la 17^a, en Salono Mergalina de la Universitato, okazis la Ĝenerala Kunveno de la Hispana Esperanto-Federacio. En ĝi estis aprobitaj ĉiuj punktoj de la tagordo. Sro. Liberto Puig, nome de la esperantistoj de Lérida proponis tiun urbon por okazigi la XXXV-an Hispanan Kongreson de Esperanto. La propono estis unuanime akceptita.

Aparte oni informos pri la decidoj kaj rezolucioj de la Ĝenerala Kunveno kaj de la Kongreso.

Je la 20^a, en sama salono okazis la Ferma Kunsido de la Kongreso. Prezidis la Prezidanto de H.E.F., Sro. Angel Figuerola Auque, kiun akompanis la ceteraj estraranoj de nia Federacio ĉeestantaj en Valladolid, kaj membroj de la Loka Kongresa Komitato.

La Prezidanto fermis la Kongreson kaj dankis ĉiujn kongresanojn pro ilia ĉesto kaj kunlaboro. Per kantado de "La Espero" finiĝis la solenaĵo.

Je la 22^a okazis la Oficiala Bankedo. Pleniĝis la granda salono de Hotel Inglaterra, kie ĉiuj kunsidis ĉe gaja kaj frata bankedo kun la espero renkonti nin venontjare en Lérida.

Mardon, 23-an

Je la 4^a posttagmeze startis la aŭtobusoj, kiuj kondukis la kongresanojn tra la nomata "Ruta Juan de Austria". Unue ni haltis en vilaĝo Castromonte por viziti la gravan industrion "CASTRO-VITA" (enboteligo de minerala akvo), kie montrinte al ni ĉion interesan oni donacis al ni memorigajn glasojn.

De tie, ni veturis ĝis la Monaĥejo "La Santa Espina" (La Sankta Dorno), tiel nomata ĉar en ĝi ekzistas relikvujo entenanta dornon de la Krono de la Savinto. La fasado de ĉi tiu monaĥejo estas verko de Ventura Rodríguez kaj ĝi apartenas al la XVIII^a jarcento. En ĉi tiu loko renkontiĝis unuafoje Reĝo Felipe la II^a kun sia duonfrato Juan de Austria. Post vizito de tiu bela kaj

tomboj, kiuj en ili konserviĝas, bone atestas pri ĝia historia graveco.

En Medina de Rioseco akceptis nin membroj de la Centro pri Iniciativoj kaj Turismo "Ajujar", kiuj akompanis nin kaj montris al ni la urbon; ni vizitis la preĝejon Sankta Maria, kies konstruado komenciĝis dum la XV^a jarcento. La ĉefa altaro estas verko de Esteban Jordá, ĝi apartenas al la jaro 1590. Apartan mencion meritas la kapelo de Benavente, tiel nomata memore al ĝia fondinto la kavaliro D. Alvaro Alonso de Benavente. Ĝi situas ĉe la Evangelia flanko kaj posedas orkoloran volbon kun pentraĵo reprezentanta la lastan juĝon, verko de Jerónimo Corral.

Promenante tra la tipaj stratoj ni ĉiuj iris en la sportejon, kie oni afable



En la ĝardenoj de la monaĥejo «La Santa Espina».

historia Monaĥejo ni denove enbusiĝis por daŭrigi vojon ĝis Villagarcía de Campos, kie dum sia infanaĝo Juan de Austria loĝis en kastelo preskaŭ ne ekzistanta nuntempe. En ĉi tiu vilaĝo estas vizitinda la preĝejo, kies fasado estas verko de Juan de Nantes, kaj la ĉef-altaro el alabastro de Juan Sanz de Torrecilla (1579 j.).

Post plia veturado ni atingis la urbeton Medina de Rioseco, unu el la plej gravaj agrokulturaj centroj de "Tierra de Campos"; ĝia portika "Plaza Mayor" (Ĉefa Placo), la preĝejoj de "Santiago", "Santa María de Mediavilla", "San Francisco" kaj tiu dediĉita al la Sankta Kruco, same kiel serio da monumentaj

kaj ĝentile invitis nin al tipa kastilia vespermanĝeto.

Dankinte la afablecon kaj akcepton de la Centro pri Iniciativoj kaj Turismo "Ajujar", kaj tre kontentaj pro la viditaj artmonumentoj, kaj la afableco kiun oni montris al ni ĉie, ni revenis al Valladolid, kie nia adiaŭo estis:

Ĝis revido venontjare en Lérica!

Inés Gastón

MEMORIA-RESUMEN DE LA LABOR REALIZADA POR LA FUNDACION "ESPERANTO" Y DEL ESTADO DE FONDOS DE LA MISMA

Durante el año 1973, se produjo un cambio en el seno del Patronato de la Fundación ESPERANTO.

Por cese de D. Giordano Moya Escayola en la Junta Directiva de la Federación Española de Esperanto y en consecuencia del Patronato de la Fundación ESPERANTO, pasó a ocupar el cargo de Patrono, el directivo de la Federación Española de Esperanto, D. Pedro Nuez Pérez, con domicilio en Barcelona, calle Muntaner, 216, 1.º.

LABOR REALIZADA

Al igual que en años anteriores, la labor realizada por la Fundación ESPERANTO, se ha centrado en la celebración de un Concurso Literario, al que podían concurrir todos los miembros de la Federación Española de Esperanto, tanto españoles como extranjeros. El tema del Concurso fue un cuento original. El Concurso fue anunciado en el Boletín de la Federación Española de Esperanto.

Se recibieron seis trabajos, habiendo resultado premiados los siguientes señores:

1.º Premio "Fundación Esperanto", Gabriel Mora i Arana, de Manresa, España.

2.º Premio "Sancho Rebullida", Vilmos Benczik, de Budapest, Hungría.

Los premios estuvieron dotados: el 1.º con 5.000 pesetas más diploma acreditativo, y el 2.º con 2.000 pesetas más diploma acreditativo.

ESTADO DE FONDOS

Durante el año 1973, el capital de la Fundación ha aumentado en nueve acciones de la Compañía Telefónica Nacional de España, recibidas por pequeñas donaciones.

El legado dejado en testamento por doña Elisa Ferrándiz, Vda. de Casanovas, continúa sin haberse hecho efectivo, por no haber vendido todavía los herederos la finca que responde al mismo.

En Caja tiene la Fundación 3.969 pesetas correspondientes al 5 % del saldo activo de la cuenta general de la Federación Española de Esperanto, año 1969, y de la cuenta del Servicio de libros, años 1970 y 1971.


Zaragoza, a treinta y uno de diciembre de 1973.

Firmado: *Inés Gastón*
Secretaría de la Fundación ESPERANTO

Dos nuevos donativos hay que sumar a los ya recibidos para la Fundación, estos son los siguientes: D. Jaime Benito, de Zaragoza, 1.560 pesetas; D. Pedro Ruiz, de Zaragoza, 250 pesetas. Total recibido en 1974: 18.090 pesetas.

NI HONORU ILIN

Responde al nia alvoko aperinta en BOLETIN —majo-junio— ni ricevis respondojn de ses el niaj maljunaj samideanoj, kiuj malgraŭ sia alta aĝo konservas bonan posedon de Esperanto, kio signifas ke ili ankoraŭ estas aktivaj membroj de nia Federacio. Ni honoru ilin, en la persono de la plej maljuna.



Juan

Aulina Saurina

Li naskiĝis en Bañolas (Gerona), la 10-an de aprilo 1887; do, en la sama jaro kiam naskiĝis Esperanto, kaj li esperantistiĝis en la jaro 1909^a okaze de la 5.^a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Barcelona.

Li tuj komprenis la grandiozan mesaĝon de la Internacia Lingvo kaj lia sesdekkvinjara laboro por kaj per Esperanto, estas pruvo de lia granda amo al nia idealo.

Profesie, li estas emerita komisiisto, kio kontaktigis lin kun multaj personoj, nu, estas facile komprenebla ke lia vivo favore al Esperanto estis tre aktiva en la propagando kaj informado pri ĝi. Dum la 3.^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio okazinta en Olot (Gerona), en 1913, nia samideano Sro. Aulina atingis diplomon de Profesoro de Esperanto, en kongresa ekzameno; de tiam, li ankaŭ sin dediĉis al instruado de la lingvo, estante fondinto de la tiama Grupo "Esperanto-Amikaro".

Post tiu ĉi biografieto de simpla homo, vera apostolo de Esperanto, nia rekomendo, kvazaŭ mesaĝo por la novaj esperantistoj: ke ili klopodu bone ellerni la lingvon kaj sekvi la celon de ĝia glora kreinto Dro. Zamenhof por esti indaj posteuloj de niaj Pioniroj.

Red.

DANKESPRIMO

Antaŭ la neebleco respondi ĉiujn leterojn kaj i bildkartojn ricevitaĵojn post la okazigo en nia urbo de la XXXIV^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO, kun gratuloj pro ĝia sukceso, ni respondas ilin pere de BOLETIN kun danko por la afablaj sendintoj.

Ankaŭ ni deziras esprimi nian dankemon al ĉiuj, kiuj helpis nin unuavice al la redaktarino de BOLETIN pro la konstanta apogo, kiun ni ĉiam trovis en la paĝoj de la organo de H.E.F. kaj poste al ĉiuj esperantistoj, speciale al Centro de Esperanto Sabadell, kiu daŭre propagandis nian Kongreson kaj informis pri ĝi.

Kaj, plej koran dankon al ĉiuj partoprenintoj en la Kongreso. Via ĉesto, rekomendo, sukcesigi ĝin, pruvis al ni ke niaj klopodoj ne estis vanaj.

Loka Kongresa Komitato

30ª INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO

Ĉi jare, la tutmonda esperanta junulara aranĝo, pro la pretendo esti konsiderata kiel serioza afero, iĝis konferenco anstataŭ kongreso.

Fakte, tia estis aŭ povus esti. Aranĝita de germanoj, do, supozeble bone, la plimulton el la programeroj konsistigis kulturaj kunvenoj de laborgrupoj pri la jenaj temoj:

- a) Junulara politiko kaj internacia junulara interŝanĝo.
- b) Cibernetiko kaj Esperanto-instruado.
- c) Elokventeco kaj praktika eduko.
- d) Edukado al paco.
- e) Problemoj de fremdlingva instruado.
- f) Kontraŭ-aŭtoritata edukado.
- g) Didaktiko de naturscienca instruado.
- h) Laborplano de T.E.J.O.
- i) Grupdinamika studrondo.

Do, tiel okazis, ke laboremuloj havis nur tempon kunsidi, manĝi kaj dormi.

Se mi iom pli klarigas, oni povas ankaŭ forstreki la tempon por manĝi, ĉar pro manko de sufiĉa nutraĵkvanto, manĝo konsistis nur el avida rigardo al malplena telero. Tio estis ĉar manĝado ja ne estas kultura programero. Feliĉe, kelkaj hispanoj, bone konantaj kuirarton kaj vivbezonojn, profitis okazon por ne morti pro malsato per pretigado kaj koncerna krommanĝado de bongustega "paella", des pli bongusta pro la dum tagoj akumulita malsato.

Nu, temis pri tutsemajna vera konferenco, ĉar nur kulturemuloj trovis kontentigon. La oficialaj distraĵ aranĝoj konsistis nur el du baloj kaj unu ekskurso kun maldikiga programo kaj malsekiga vetero. Por venonta I.J.K., vivu la seriozeco!... sed ne forgesu junecon, distron, kaj... manĝon!

Miguel Angel Altuna


BIBLIOTECA-ARCHIVO DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

De nuevo he de manifestar mi agradecimiento a los que respondiendo a mi llamamiento en BOLETIN de mayo-junio, han enviado ejemplares de BOLETIN correspondiente a los números que faltaban para poder ser encuadrada la colección completa.

Esta vez, los amables donantes han sido D. Luis Hernández Izal, de San Pablo de Ordal; D. José Guzmán Guzmán, de Valencia y D. Vicente Hernández Llusera, de Sabadell. Después de estos envíos ya solo falta en la colección el número 15, correspondiente al año 1950.

Mi agradecimiento a los mencionados señores por su colaboración, así como a la Srta. Clementina Tranque, de Valladolid, que ha enviado 150 pesetas para ayuda de los gastos que esta encuadración ocasione.

Inés Gastón



La Prezidantaro de la Solena Inaŭguro de la Kongreso, dum la festparolado de la Prezidanto de U.E.A., Prof. Dro. Ivo Lapenna.

La okazigo de la 59^a Universala Kongreso de Esperanto en la Kongres-Centro Hamburgo (CCH), unu el la plej belaj kaj komfortaj kongresejoj kiujn ni ĝuis laŭlonge de la jaroj, kaj la afableco kaj bona servo de la deĵorantoj en la ĝiĉetoj, ne kompensis la etoson de ĉagreno kaj tristo kiu ĝenerale regis dum la Kongreso.

Kiam en la monato majo, eksterlanda samideano nin vizitanta montris al mi Esperanto tradukon de cirkulero subskribita de Pavel Rosa, prezidanto de AE SSR; ing. Fr. Svitak, ĉefdelegito de U.E.A. kaj Josef Vitek, prezidanto de ĈEA, kaj disdonita al ĉiuj delegitoj de UEA en ĈSSR. Afero: Elekto de komitatanoj "B" por periodo 1974/77; mi preskaŭ ne povis kredi kion mi legis:

"Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj la Asocio de Esperantistoj SSR deziras ke la balotojn partoprenu ĉiuj niaj delegitoj de UEA (laŭ la Jarlibro 1973), iliaj voĉoj validu kaj ke la

elektitaj komitatanoj de UEA kontribuu kaj al niaj interesoj kaj al interesoj de ĉiuj Esperanto-movadoj en socialismaj ŝtatoj kaj certe ankaŭ al interesoj de UEA. Tial ni rekomendas al vi kaj petas vin kiel delegitojn de niaj asocioj sekvi jenan proceduron."

Post konkretaj instrukcioj pri kiuj devas esti elektitaj, k.t.p., ili finas:

"Per tiu ĉi proceduro ni realigos komunajn interesojn. Ni denove atentigas, ke ne temas pri via privata opinio dum voĉdonado, kiel tion prezentas foje organoj de UEA, sed pri neceso voĉdoni tiel, kiel tion bezonas organizaĵo, kiu vian delegitecon aprobis. Ni atendas vian disciplinatan obeemon."

Kion povas esperi UEA de Komitato konsistanta plejparte el komitatanoj, kiuj unue kontribuu kaj al siaj interesoj kaj al interesoj de ĉiuj Esperanto-movadoj en socialismaj ŝtatoj kaj certe ankaŭ al interesoj de UEA;

do, nur laste al interesoj de UEA?

Feliĉe la delegitoj de UEA ne forgesis la kampanjon kontraŭ neŭtraleco kaj sekve kontraŭ nia Prezidanto Prof. Dro. Ivo Lapenna, kiel bastiono de neŭtraleco, kampanjo jam komencita en la jaro 1969^a; nek ankaŭ forgesis ke en la jaro 1970^a, pro komunistaj kampanjo fare de Esperanton-parolantaj partoprenantoj en la Kongreso de TEJO en Graz (Aŭstrujo), la aŭstraj aŭtoritatoj forpelis de la lando grupon da kongresanoj; nek ankaŭ forgesis tiom da kalumniaj kaj insidaj onidiroj kaj artikoloj kiujn ĉiuj, kiuj sekvas la Esperanto-movadon povis aŭdi kaj legi; sekve de tiuj neforgesitaj faktoj, en la elekto de komitatanoj "B", regis vere demokratia spirito, kaj ne brua *demokratio*, kies rezulton vi ĉiuj konas; Dro. Lapenna estis elektita per pli multe da voĉoj ol kiu ajn kandidato kaj ol kiam ajn antaŭe, kaj sekvis ankaŭ kun granda plimulto Dro. Régulo Pérez, Fino. M. Vermaas, Sro. Jean Thierry...

Alvenis la Kongreso, kaj dum la unua kunsido de la Komitato, la elekto de komitatanoj "C". Mi ne ĉeestis la kunsidon ĉar mi ne apartenas al la Komitato, sed, tuj alveninte mi estis informita: Dro. Lapenna forlasas ĉion, la Komitat-kunsido estis vera skandalo... Orienteŭropaj esperantistoj diris al mi: ni estas ege ĉagrenitaj, ni ne povis supozi tiajn okazintaĵojn, niaj komitatanoj ne povis libere voĉdoni ĉar kiel oni diris al ni, en la elekto oni ne konsideris la meritojn de la kandidatoj, sed la intereson de la partio. Mi trankviligis ilin, senduble ili pensis al nia amikeco, kaj bedaŭris ke pro la partio iliaj komitatanoj ne povis voĉdoni min. Mi estis kandidatigita de Fino. Vermaas kaj kelkaj aliaj por komitatane "C".

Komprenable, ne sole la orienteŭropaj komitatanoj kulpas pri la vere naŭza agado antaŭ kaj dum la Kongreso; por ili Esperanto estas nur ilo kaj antaŭ ĉio ili devas obei la partion; malgraŭ tio, ni ne devas forgesi, ke krom la germano Sro. Moritz, unu el la ĉefaj intrigantoj, dum la diskutoj en Londono antaŭ tri jaroj, nur bulgaroj sin esprimis aperte kontraŭ neŭtraleco, kaj nun, estis bulgara komitatano Aleksiev, kiu gvidis la puĉon, kaj Sro. Moritz unu el la altruditaj komitatanoj, (li ne atingis voĉojn kiel komitatano "B"), sed, sendube la partio nomis lin komitatano "C".

Laŭ mia opinio, kiuj vere kulpas, estas grupeto da intrigantoj kaj kom-

plotantoj en okcidenteŭropaj Landaj Asocioj, kies fanfaronemo kaj fiereco estas tiaj, ke ili ne povis toleri la prestiĝon kaj kapablon de nia Prezidanto, Prof. Dro. Ivo Lapenna, kaj profitante sian favoran situacion interne de la Universala Esperanto-movado, ili ne hezitis uzi ĉiajn perilojn por faligi lin. Ili atingis sian celon, sed nun ne devas forgesi, ke perfidulojn oni ne bezonas, kiam perfido estas jam pasinta. Kaj, ankaŭ kulpas kiuj pro politika naiveco aŭ simple pro naiveco, facile falis en la reton de la komplotintoj.

La Interkona Vespere okazis en bela, granda salono de la Kongresejo. "Kvarteto Esperanto" el Trenĉin (Ĉeĥoslovakujo), klopodis gajigi la etoson.

La Solena Inaŭguro elstaris pro la nombro da reprezentantoj de registaroj. Inter ili la Konsuleja Kanceliero Sro. Iniguez, de Hispanujo. Specialan mencion meritas la reprezentanto de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de Israel kaj la Ĝenerala Konsulo de Usono, kiuj salutis en Esperanto; same adresis bondezirojn en Esperanto, Sro. Ernie Money, brita opozicia ministro pri kulturo kaj gvidanto de la Grupo por Esperanto en la Brita Parlamento, Dro. A. Menabene nome de Socialista Internacio kaj Itala Socialdemokrata Partio, Sro. J. Berggreen por la Skolta Monda Oficejo kaj Prof. V. Pevski en la nomo de Tutmonda Federacio de Sciencistoj.

La ceteraj ŝtataj reprezentantoj parolis nacilingve kun sinsekva traduko en Esperanto.

Kiel kutime la solenaĵo estis dividita per muzikaj paŭzoj.

Pro tre multaj oficialaj salutantoj ne estis tempo por la kutimaj salutoj de la delegitoj de la Landaj Asocioj, el 35 landoj; ili nur povis esti prezentitaj al la kongresanoj. Nome de la Infankongreseto alparolis du knabinoj.

La Solena Inaŭguro finiĝis per la Festparolado de la Prezidanto de UEA, Prof. Dro. Ivo Lapenna. Kiel kutime ĝi estis majstra elmonro de oratoreco. Post superrigardo pri la historio de la Universala Kongresoj, omaĝo al la kongresa lando kaj prituŝo de la kongresa ĉeftemo, Dro. Lapenna deklaris ke dum ĉi tiu Kongreso, li retririĝos el ĉiuj siaj funkcioj en la Universala Esperanto-Asocio. Granda surprizo de la plej multaj kongresanoj kaŭzis emociigan murmuradon kiu subite trairis la salonojn. Je la fino la kongresanoj ekstaris kaj dum kelkaj minutoj ovaciis

al la konstruinto de la moderna UEA. Krom la aplaŭdoj, klare aŭdiĝis frazoj kiel: Ni volas Lapenna. Lapenna kun ni. Lapenna, Lapenna, Lapenna...

Per komuna kantado de "La Espero" finiĝis la solenaĵo.

Por la unua fojo, en miaj jaroj de esperantistino, ŝajnis al mi sensenca ĉi tiu kunkantado de nia himno ĉar, jam de 1969^a oni klopodis, kaj la klopodoj kulminis en ĉi tiu kongreso ne niigi la fratecan spiriton kiun Dro. Zamenhof inspiris al Esperanto kiam li ĝin kreis.

La prelegoj de I.S.U. estis ja interesaj, ĉiuj prelegantoj estis varme aplaŭditaj, sed la ovacio dediĉita al Dro. Lapenna estis eksterordinara, ĝi akompanis lin ĝis la eliro de la salono; verdire, ĉiu interveno de Dro. Lapenna en la diversaj kunvenoj estis okazo, kiun la pli multaj kongresanoj profitis por elmontri sian ligitecon, respekton kaj simpatian al li.

La bulgara Esperanto-Teatro prezentis la verkon "La Barbiro de Sevilla" en bonega Esperanto-traduko de Sro. Kiril Drajev, la geaktoroj ludis siajn rolojn eksterordinare bone; entute, brila Teatro-prezentado. Varma aplaŭdado premiis la laboron de la artistoj kaj de Sro. Drajev. La "Internacia Vespero" laŭ informoj ricevitaj (mi ne povis ĝin ĉeesti), estis ja altvalora. Ne tion ni povas diri pri la "Germana Vespero", ĝi ne multe valoris, la muzikado de diversaj ĉasistaj signaloj per trumpetoj kaj ĉaskornoj estis interesa kaj la muzikistoj sin prezentis bone vestitaj per ĉasistaj uniformoj. Je la fino la muziko estis ilustrita per lumbildoj. Alia programero estis amatora tridekvira kanthoro, kiu por la fino de ĝia prezentado kantis maristajn kantojn en Esperanto kaj en la hamburga dialekto, kiuj entuziasmigis la publikon, kiu dum la ripetadoj de la kantoj balanciĝis dekstren-maldekstren laŭ la takto de la kanto. Folkloro dancgrupo en naciaj nordgermanaj kostumoj prezentis tipan germanan dancon. La konata esperantista verkisto Jean Forge legis pri siaj rememoroj, kaj finis per deklamado el la verko de Goethe en traduko de Zamenhof "Ifigenio en Taŭrido". La publiko aplaŭdis je la fino.

Ekster la oficiala programo, dum la Kongreso prezentis Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski el Varsovio, ludante dupersonan teatraĵon "Proksima nekonato" de A. Scibor-Rylski en Esperanto-traduko de Jerzy

Grum. La publiko alte taksis tiun kulturan eventon kaj entuziasme aplaŭdis la geaktorojn.

La bankedo kaj balo okazis lundon vespere. Post la bankedo, ĉiuj kongresanoj venis en la granda danssalonon. Ludis la muzikon "Kvarteto Esperanto" el Ĉekoslovakujo, kiu per siaj muziko kaj kantoj bone gajigis ĉiujn distrajn aranĝojn. En agrabla atmosfero la kongresantoj amuziĝis ĝis noktomezo.

En tiu sama tago okazis la Oficiala Akcepto. La Vicurbestro de Hamburgo, Dro. H. J. Seeler akceptis en la Urbodomo 200 invititajn kongresanojn el ĉiuj landoj reprezentitaj en la Kongreso, el Hispanujo ĉeestis la sekretario de H.E.F., Sro. González Aboín kaj mi. La Vicurbestro alparolis al la kongresanoj. La Urbodomo de Hamburgo, tre bela, estas ja vizitinda.

Dimanĉon, je la 5^a posttagmeze okazis Ekumena Diservo. Partoprenis en la Liturgio ok kongresantaj pastroj: 4 protestantaj (luteranaj kaj reformistaj) kaj 4 katolikaj, ankaŭ partoprenis ĝin du lokaj pastroj. La liturgion gvidis la prezidanto de I.K.U.E., pastro F. Longoni el Italujo, kantis la kanthoro de K.E.L.I., pastoro A. Burkhardt el Germanujo FR. gvidis la kantojn kaj predikis pastoro G. Brinkmann. Multnombraj kongresanoj partoprenis ĝin.

Kiel kutime, okazis du Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA, la tagordo de la unua konsistis el tri punktoj: Salutoj de fakaj Esperanto-organizaĵoj; Ĝenerala diskuto pri la raporto de la Estraro de UEA (laborjaro 1973/74); Diskuto pri plifortigo de la Landaj Esperanto-Asocioj. Prezidis la kunvenon Prof. B. Popović.

Salutis 15 organizaĵoj. Enkondukis la diskuton de la dua punkto de la tagordo la ĝenerala sekretario de UEA, Sro. Günther Becker, kiu komence kaptis la okazon anonci al la kongresanaro, ke li devas retiriĝi el siaj funkcioj en UEA. Samtempe la prezidanto de UEA informis la kongresanojn, ke Sro. Harry W. Holmes decidis ekŝiĝi el la honora prezidanteco de UEA en ligo kun la elekto en la Komitato. La membraro elmontris sian bedaŭron pro la okazintaĵoj kaj sian respekton kaj simpatian al la Honora Prezidanto de UEA, Sro. Holmes kaj al la Ĝenerala Sekretario Sro. Becker. La diskuto estis tre vigla. Ĉar ĝi daŭris tre longe, restis nur tempo por skiza enkonduko de la tria punkto, fare de la estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj Dro. Werner Bormann.

En la Dua Generala Kunveno de UEA oni pritraktis la temon: Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo. Prezidis la kunvenon Sro. Erik Carlén. Prezintis la temon kaj enkondukis la diskuton Prof. Dro. Ivo Lapenna, kiu respondis ĉiujn demandojn. Pro la intereso de la temo kaj la deziro ĝui unu plian fojon la lernigan oratorecon de Dro. Lapenna, la nombro de kunsidantoj estis multe pli alta ĉi-jare ol en antaŭaj jaroj. La diskuto kiu sekvis la enkondukan paroladon ĉiam revenis al terminologia problemo, malgraŭ tio oni ne sukcesis alveni al interkonsenta difino de la baza terminaro.

Fininte la Generala Kunveno de UEA, Prof. Lapenna suriris denove la podiumon por fari sian adiaŭnan paroladon per kiu li deziras ekspliki la kaŭzojn, kiuj motivas sian decidon ekŝiĝi el ĉiuj siaj funkcioj en UEA al la membraro de la asocio.

Dekomence, Prof. Lapenna deklaris ke li ne volas fari kian ajn malbonon al Esperanto; tute male, ĝis mia morto —li diris— mi dediĉos miajn fortojn al Esperanto. Mi volonte publikigus la kompletan paroladon por ke vi estu bone informitaj, —sed bedaŭrinde mi ne sonbendigis ĝin— kio estis klara bildo de la manovroj de kelkaj uloj komencitaj (almenaŭ de mi konate) en la jaro 1969^a kaj kiuj kulminis en ĉi tiu Kongreso. Post pluraj klarigoj kaj komentoj, Prof. Lapenna aldonis ke neniam kaj nenie li havas malamikojn krom kelkaj en la Esperanto-movado, sed ke li plue fidas, ke 95 % estas liaj amikoj en UEA.

Li finis per jenaj vortoj: “Mi do deziras danki tutkore al ĉiuj, kun kiuj mi amike kunlaboris dum multaj jaroj. Sen ilia helpo UEA hodiaŭ ne ekzistus. Kiam Zamenhof pro similaj kaŭzoj estis devigita retiriĝi en Krakovo, li diris: “Vi ne plu vidus min antaŭ vi, vi vidus min inter vi”. Mi ne faros kiel Zamenhof, ĉar, kvankam mi admiras lian naturon, mi havas alian naturon, kaj mi ne hontas pri mia alia naturo. Mi do ne diras al vi: “Vi ne plu vidus min antaŭ vi”. Mi ne diros, ke vi vidus min inter vi, sed mi diras al vi: “Koran dankon kaj adiaŭ por ĉiam!”.

Nova ovacio de la membraro al sia Prezidanto; super la tondra aplaŭdado daŭre aŭdiĝis: Ni volas Lapenna! Lapenna kun ni! Lapenna kun ni! Lapenna kun ni!...

Dum la kongresa semajno okazis ankaŭ: Laborkunsido de la respondeculoj de Landaj Asocioj por pritrakti

la temon: “Kion fari kontraŭ la perdo de membroj?”; Debato pri “Landaj revuoj en Esperanto - ĉu utilaj?”; Laborkunsido de la Akademio de Esperanto kaj de kelkaj dekoj de Fakaj Asocioj, kaj, kompreneble la Komitato daŭre kunsidis.

Kaj... ni alvenis al la fino de la Kongreso. Dum la lasta Komitatkunsido, Prof. Dro. Ivo Lapenna prezentis sian anoncitan ekŝigon el ĉiuj funkcioj de UEA. t.e.: Direktoro de Centro de Eksploro kaj Dokumentado, kunredaktoro de La Monda Lingva Problemo, komitatano “B” de UEA (elektita —kiel dirite— per pli multe da voĉoj ol kiu ajn alia kandidato kaj ol kiam ajn antaŭe), Honora Membro de UEA, Honora Membro de TEJO... kaj, vere pozitiva aganto favore al Esperanto mi aldonas. Post la elekto de la nova estraro, Dro. Lapenna forlasis la salondon kaj kun li kelkaj komitatanoj kaj pluraj esperantistoj el la publiko.

Ankaŭ prezentis sian ekŝigon Sro. Jean Thierry (Francujo), Dro. Juan Régulo Pérez (Hispanujo) kaj Fino. M. Vermaas (Nederlando) el Komitatano “B”; Prof. G. Waringhien el funkcio de Prezidanto de Belartaj Konkursoj; Sino. Emilija Lapenna el sekretarieco de Belartaj Konkursoj, la Jurista kaj Instruista Asocioj el UEA, kaj ankaŭ okazis pluraj ekŝigoj el membreco de la Asocio.

Nun, memorante la diversajn diskutojn dum la publikaj Komitatkunsidoj, dum kiuj oni petas pruvojn pri ĉiuj asertoj kaj kiam venas pruvo pere de letero, la subskribinto de la letero forte protestas “pro la malkorekta ago” legi “privatan leteron”, kiun tute ne estis privata, mia penso iras al tiu Prezidanto de Landa Asocio aliĝinta al UEA (Germana Esperanto-Asocio), en kies oficiala organo aperis grava artikolo kontraŭ la hispanaj Reĝimo kaj Registaro, rompante la neŭtralecon, kiu devis regi en UEA kaj sekve en la Landaj Asocioj al ĝi aliĝintaj, kaj krom permesi la publikigon de la dirita artikolo, donis al ĝia subskribinto vere privatan leteron adresitan al la Asocio, por ke li publikigu kaj uzu ĝin laŭ sia plaĉo. Ĉu tiu ago de la dirita Prezidanto, Dro. Werner Bormann, Prezidanto de Germana Esperanto-Asocio kaj estrarano de UEA estas ja korekta kaj neŭtrala?

Post tiu Kongreso plej bedaŭrinde estas konstati en kiajn manojn venis la gvidado de la Universala Esperanto-Movado!

Inés Gastón

HISPANA LIRIKO

La suban, faman soneton oni atribuis al diversaj aŭtoroj, interalie al Santa Teresa de Jesús, Francisco Javier, San Ignacio de Loyola, Lope de Vega, sed oni ne scias, kiu vere ĝin verkis. En diversaj epokoj kaj revuoj oni jam aperigis kelke da versioj Esperantaj de ĉi tiu soneto. Jen nun mia provo:

SONETO AL KRISTO SUR LA KRUCO

Por ami Vin ne movas min la Vorto,
ke nin atendas la ĉielo bona,
nek movas min la tim' al fajr' gehena
por ne ofendi Vin per peko-porto.

Vi movas min! Min movas Via sorto
surkruca, senhelpa, abomena.
Min movas Via korpo vundoplena,
min novas koroŝire Via morto.

La amo al Vi min tiele levas,
ke eĉ sen paradizo mi Vin amus,
eĉ sen infero-fajro mi Vin timus.

Premii mian amon Vi ne devas,
ĉar, eĉ se la esper' en mi ne flamus,
la saman amon mi al Vi esprimus.

Traduko: *Fernando de Diego*

ESPERANTISTA LIRIKO

LA MALESPERO

En la mondon venis malkonsento,
tra la mondo iras honta moko,
pro intrigoj de malica gento.
Estroj falas de sur sia loko.

Ne al paco amon ĝuiganta
venas nun la homa familio;
en la mond' eterne disputanta
plu certiĝas la malharmonio.

Sub la ŝajna signo de l' espero
kolektiĝis gravaj intrigantoj,
kaj subite stagnas la afero
pro la ruzo de la subfosantoj.

Forte staras la miljaraj muroj
inter la popoloj konfuzitaj;
kaj plu staros la babelaj turoj
de la klana vol' fortikigitaj.

Sur ŝanĝita lingva fundamento
agacante unu la alian,
la adeptoj faros sen konsento
unu lupan, rondon milpartian.

Niaj plej kuraĝaj laborantoj
en klopodoj vanaj ja laciĝos,
kaj la revo de la esperantoj
por eterne ne efektiviĝos!

Salvador Gumá

VESPERAJ SONOJ

Antaŭ de l' vesper' foriro,
kiam mi solece sidas
min vizitis la inspiro:
strofojn mi al vi konfidas.

Mi rakontos pri la sonoj,
kiuj dum vespera horo
aŭdas mi, ĉar tiuj sonoj
estas kaŭzo de l' angoro.

De l' Amoro firmaj manoj
kordon de la koro streĉis,
de l' Eol' penetraj anoj
al silento finon metis.

Sonoj, sonoj... Ravaj sonoj
en animo mia nestas:
de malĝoj' kaj ĝoj' resonoj,
atentindaj vi ja estas!

Vin aŭskultas mi eterne,—
la animo ardas kiam,—
Vi ordonas el interno
ekforgesi dormon mian.

Jen amaso brua via
furiozas en la koro,...
kredu, ke tormento tia
restos longe en memoro.

Vi devigas min maldormi
ĝis malfrua nokta tempo,
kvankam jam deziras dormi
ŝajne verda eĉ printempo.

Belaj sonoj, ĉarmaj sonoj,
jen aŭdiĝas vi denove...
Atentigu la bezonon,
kuŝu sin kun mi senmove!

RENE SANCO

Ne taŭgas ridi, gesinjoroj,
—min ne favoris ja feliĉ':
pasigis tagojn mi senlorajn,
renkontis min en viv' malic'.

Per griza viv' mi tiam vivis
de zorgoj fore kaj de bru';
mi jaroj dudek kvin naivis,
elteni mi ne povas plu.

Do, mi post viv' decidis flui
kaj vivi kiel papili':
frivole per la vivo ĝui,
fariĝi gaja pli kaj pli.

Nun diros mi al vi konfese:
foriĝis asketecon mi
kaj jen rapidas mi je l' sesa
por la unua rendevu'.

Anatolo Koba
Krivoj Rog - USSR - 1974

LABORU KAJ ELSPEZU

Cu estas eble ke iu lingvo fariĝos (ĉu kiel dua, ĉu kiel unika) universala idiomo?

Ni ĉiuj, esperantistoj, devas respondi: jes!

Cu Esperanto estas taŭga lingvo por esti universala?

Ni ĉiuj, esperantistoj, devas respondi: jes!

Se ekzistas tiu ĉi ebleco, kial Esperanto ne estas jam universala lingvo?

Ni estas, sinjoroj, en la jarcento de la rapideco!

Kial la "Movado" kvazaŭ haltadas, kial ĝi preskaŭ stagnas?

Cu ni povas kulpigi pri tio ĉi la Neesperantistojn? Sendube, ne!

Do, nepre, ni ĉiuj, esperantistoj, estas la kulpaj, ne vere?

Nur kredo kaj bonaj deziroj nek sufiĉas, nek sufiĉos.

—oOo—

En la mondo ekzistas idealistoj, jes (ni ĉiuj, esperantistoj, estas ekzemploj!), sed, ĝenerale, la Homaro agas laŭ la Leĝo pri la Minimuma Peno; la homoj nur laboradas, se ili bezonas labori.

Tial, por ke la homoj neidealistoj fariĝu esperantistoj, estos necese ke lerni Esperanton estu por ili bezona (aŭ tre konvena) afero.

Zamenhof, nia Majstro, jam diris:

"...Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej signifa popolo havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj..." (Letero al Kofman, 1901. En "Originala Verkaro" pĝ. 322).

Jen Majstra celo por ni ĉiuj, esperantistoj: fari nian unuan Esperantujon!

Kie? Kompreneble, ni devas elekti iun landeton (Liĥtenŝtejno, Monako, San Marino, Andoro...) aŭ etan insulon, kies loĝantaro estu proksimume 10.000-20.000 homoj.

Kiel esperantigi ĝin? Kun laboro kaj mono. Kiom da mono? Kalkulu: Ĉiu esperantisto donu 1.000 pesetojn jare (ni ĉiuj, esperantistoj, estas idealistoj, ĉu ne?...), kaj baldaŭ la mono trosufiĉos. Poste, oni devas organizi, laŭ la esperanta vidpunkto, ĉi tiun landeton: aranĝi turismon, radiodissendojn, eldoni librojn, revuojn, ĵurnalon...

Tiam kaj tie, Esperanto enradikiĝos kaj estos bezona lingvo por la tuta loĝantaro.

Kiel mi diris (aŭ pensis kaj ne diris), tio estas nur la unua paŝo. Pri la dua, kaj tria..., mi havas ideojn. Sed mi ne volas anticipi ilin.

Kiam la unua paŝo estos farita (baldaŭ, sendube!), mi parolos...

Utopio? Ne! Utopio estas kredi, pensadi, ke farante nenion, man' sur mane, ni ĉiuj, esperantistoj, povos ion atingi...

José Olavide



Vilmos Benczik

MORTO DE SOLDATO

Kiam li rekonsciigis, jam estis tago, la suno staris alte, kaj —kvankam ankoraŭ ne finiĝis marto— eĉ donis iom da varmo. La folioj apenaŭ burĝonis sur la branĉoj de la junaj kverkoj, kaj dank' al tio la sunradioj sen malhelpo atingis la malvarmumintajn ostojn de Vasilij. Gue li rigardis la ĉirkaŭaĵon: la arbaro ĉiam forte altiris lin, kaj tiu amo estis eĉ pli obstina, ol la deziro de lia juna korpo. Li ŝatis Nataŝan, vere ŝatis, kaj la formoj de la knabino ne estis malmulte ekscitaj, sed kiam ŝi anoncis, ke neniel ŝi estas preta loĝi je dek kvin mejloj de la vilaĝo, la sorĉo, kiu radiis el ŝi, malaperis por ĉiam. Eĉ la penso, ke li devus forlasi la arbaran dometon, pikis la koron de Vasilij. Sendube, forlasinte la arbaristan postenon facile trovus laboron en la lignouzino, sed la urban vivon li vidis tro brua, mankis el ĝi la senpera kontakto kun la naturo, sen kiu la vivo ja ne estas vera vivo, sed nura ekzisto.

Nataŝa ofendiĝis kaj baldaŭ edziĝis al juna segisto en la lignouzino. Vasilij —eĉ li mem miris pro tio— ne multe malĝojis: la ĉiumatena birdokanto, la orekkaresa muziko de la konstanta surrado de la folioj kompensis lin por ĉio. Krome, eĉ tempon li havis malmulte por malĝoji: la milita situacio

Cifoj estas hungara samideano kiu aperas en la paĝoj de BOLETIN kiel premiito; li estas la aŭtoro de la rakonto "MORTO DE SOLDATO", per kiu li gajnis la premion "Sancho-Rebulla" en la pasintjara Literatura Konkurso de Fundación ESPERANTO.

Dro. Vilmos Benczik naskiĝis la 11-an de julio 1945. Li akiris diplomon en la Budapeŝta Universitato pri hungara, rusa kaj hispana filologio. Nuntempe, li laboras kiel prikultura eduk-pedagogo en studenta hejmo por studentoj el la Tria Mondo.

Tradukinto de pluraj hispanaj kaj hispanoamerikaj romanoj al la hungara lingvo. En Esperantujo li debutis kiel poeto, sed nuntempe estas konata kiel kritikisto kaj aŭtoro de priliteraturaj eseoj en Norda Prismo kaj Hungara Vivo.

Koran gratulon al nia estimata samideano.

en la eŭropa parto de la lando onidire estis tre malbona, kaj li tute ne surpriziĝis, kiam li ricevis la invitilon por soldatservi. La militon li ne ŝatis, ĝi estis fremda al lia pacema naturo, sed li konsideris ĝin neevitebla destino de la junaj rusaj viroj de tiu epoko. Honeste, obee li batalis, sed pasie atendis la finon de la masakro, kaj transpaŝinte la limon inter Ukrainio kaj Hungarujo li sentis, ke tiu fino jam ne estas malproksima.

La lastaj monatoj jam pasis kun helika malrapido: batali sur fremda tero estis multe pli malfacile, ol hejme, kie ne nur la homoj, sed ĉiu arbo, birdo, survoja ŝtoneto estis lia amiko. Antaŭjuĝojn li ne havis —la longa arbara vivo ĉion tian forblovis el li— tamen li timis la hungarojn. Ĝis la antaŭa nokto la kugloj ĉiam cvitis lin, sed nun en la ventro li sentis ĉiam pli akutan doloron kaj kun angoraĵ sentoj li konsciigis, ke li kuŝas senhelpa, vundita en hungara arbaro kaj verŝajne liaj kamaradoj estas for. Iomete trankviligis lin la penso, ke tiu malpleno da hungaraj kaj germanaj soldatoj certe estis venkitaj, do ĉiukaze li restis sur liberigita teritorio, sed ŝajnis neprobable, ke eĉ unu rusa soldato restis en tiu ĉi provinco, konsis-

tanta el etaj vilaĝoj. Kun forte batanta koro li spektadis la junajn kverkojn, sed lin endormigis jam la trankviliga konstato, ke la hungaraj kverkoj neion diferencas de la rusaj.

Kiam li vekigis, li trovis sin en malgranda, ne tro hela, sed pura ĉambro. La lito, sur kiu li kuŝis, estis iomete malkomforta, sed la moleco de la blanka lankovrilo estis agrabla. Kun konsterno li rimarkis, ke lia uniformo estas for, kaj li surhavas fremdajn subvestojn, sed baldaŭ komprenis, ke tio ne povas esti alie, ja certe ĉiun lian veston difektis la kuglo kaj la elfluinta sango. Li konsciis, ke li estas en domo de hungaroj, sed strange, lia timo prekaŭ tute forvaporigis, kaj ne ango-re, prefere kun scivolo li atendis, ke la pordo malfermiĝu kaj aperu tiu homo, kiu portis lin ĉi tien.

Longe atendi li ne devis, ĉar pasis eble nur duonminuto, kaj malantaŭ la knare malfermiĝanta pordo li ekvidis la figuron de maljuna, eble sepdekjara virino. Ŝian surkitan vizaĝon ombrbis zorgoj, sed rimarkinte liajn malfermitajn okulojn ŝi tuj sereniĝis. Iris al la lito, kun patrina tenero frapetis liajn vangojn, poste rapidpaŝe eliris, sed jam post kelkaj momentoj revenis al la ĉambro, en la manoj kun telero da vaporanta supo. Vasilij abrupte eksentis en la stomako tranĉan doloron kaj avido etendis la brakon por preni la kuleron, sed la maljunulino milde repuŝis lin kaj mem komencis manĝigi al li la supon. Fininte ŝi denove frapetis liajn vangojn kaj tiel senvorte, kiel ŝi venis, ŝi eliris el la ĉambro.

Vasilij sentis, kvazaŭ la vaporo de la bongusta, varma supo kovrus lian cerbon kaj endormigis. Li dormis tre multe: fakte lia vivo reduktiĝis nur je la aperoj de la maljunulino kun la manĝaĵo kaj je dormado. Foje-foje li povis komenci interparolon kun la virino, sed tiu ĉiam nur skuis ridetante la kapon, kaj eĉ en sia lingvo ne elparolis vorton. Vasilij longe pensadis pri la kialo, ja la tenera zorgado kaj la senvorta silentado iel ŝajnis kontraŭdiraj. La misteron solvis la apero de maljunulo —videble ankaŭ li apartenis al la domo— kiu komencis rapide gesti per la manoj kaj la fingroj, kaj tuj ankaŭ la virino interrompis la manĝigon kaj respondis al li sammaniere. Surdmutuloj —komprenis fine kun kompato Vasilij—.

Post tiu okazaĵo li rezignis pri la provoj interparoli, kaj penis esprimi siajn pensojn, sentimentojn, farton per

sia vizaĝo. La tempo pasis, kaj iun tagon li povis forlasi la liton. Dum kelkaj tagoj li ankoraŭ sidadis en la domo, sed baldaŭ li eliris kaj provis helpi al la maljunulo en la hejmaj laboroj: haki lignon, fosi la malgrandan ĝardenon, alporti akvon de la sufiĉe malproksima putro. La maljunulo akceptis danke lian helpemon, kaj post certa tempo iuj laboroj fariĝis ekskluzive lia tasko.

La dometo kaj la korto de la maljuna geedza paro —ĉu ili estis geedzoj, ĉu gefratoj, ĉu nur du samsortanoj, neniam li eksciis— estis sufiĉe malriĉa. Dombirdoj aŭ aliaj bestoj tute mankis, kaj nur nun Vasilij vere komprenis, kiom da penado povis kaŭzi al ili lia nutrado: post tio kun duobla fervoro li helpis ilin en la cetero ne tro multa laboro. Li fartis bone en la dometo, la izoliteco, la silento iel memorigis al li sian hejman arbaran vivon, sed baldaŭ li ekpensis pri sia taĉmento, kaj klopodis malkaŝi kie estas lia uniformo, sed nek la virino, nek la viro povis aŭ volis kompreni, kion li celas. Ne povinte ion ajn ekscii pri tio, li decidis iri al la vilaĝo —la dometo de liaj savintoj staris aparte sur la rando de la arbaro— por informiĝi, kiel statas la afero de la milito kaj kie li povos trovi siajn karamadojn. Li sciis iomete la germanan lingvon —en la lernejo dum jaroj li studis ĝin— kaj la instruisto de la vilaĝo rakontis al li, ke la milito finiĝis, kaj rusaj soldatoj plej proksime troviĝas en la provinca centro, kiu kuŝas je kvindek kilometroj. Vasilij dankis pro la informo, hejmeniris —la dometon de la maljunaj savintoj li preskaŭ konsideris hejmo— tamen li decidis jam morgaŭ ekvoji al la provinca centro.

La sekvan tagon frumatene li provis komprenigi al la maljunulino sian intencon, sed tiu ankaŭ nun nur skuis la kapon kun serena rideto. Li alvokis la maljunulon, sed komence nek tiu malkaŝis pli da inteligento, kvankam Vasilij gestis, desegnis en la polvo de la korto, mienis kvazaŭ pantomimartisto, sed vane. Fine en la cerbo de la viro io lumiĝis, li rapide gestis ion per la fingroj al la maljunulino, kaj tiu kun mizera mieno komencis plori kaj per ambaŭ manoj kaptis la dekstran brakon de Vasilij. Li provis liberiĝi, sed la virino tiel forte kroĉiĝis al li, ke fine li decidis prokrasti la foriron kaj pene sciigis tion al la ploranta maljunulino.

Li daŭrigis sian pli fruan vivon, kun

tiom da diferenco, ke ne ĉiam li restadis ĉirkaŭ la dometo, sed foje-foje iris al la vilaĝo, kie pro la komprenebla manko de vira laborforto, ĉiu akceptis lian helpon volontege. Liaj "vilaĝiradoj" fariĝis ĉiam pli oftaj, fine preskaŭ ĉiutagaj, kaj vespere neniam li revenis kun malplenaj manoj: li alportis tranĉaĵon da ŝinko, duonparon da kolbaso, lardon aŭ panon, kaj kvazaŭ fieri li transdonis la manĝaĵon al la maljunulino, kiu ĉiam dividis ĝin je kvar egalaj pecoj, du ŝi donis al Vasiliĵ, unu al la maljunulo kaj unu konservis por si mem. Komence Vasiliĵ volis komprenigi al ŝi, ke ŝi tranĉu ĉion je tri pecoj, sed la maljunulino nee skuis la kapon, kaj fine li mem ankaŭ komprenis, ke laborante tutan tagon li vere bezonas pli da manĝo, ol ili.

Li ne forgesis plene pri sia intenco iri al la provinca centro, sed la silento de la malgranda vilaĝo, la trankviliga ritmo de la ĉiutaga laboro kaj la sorĉo de la arbaro tute katenis lin. Foje-foje li pensis pri la eblaj konsekvencoj, li sciis bone la armean regularon, sed eĉ la timo konsideriĝi dizertulo ne povis forpeli lin. En la vilaĝo li estis ŝatata persono: eĉ tiuj, kiuj malsimpatii kun la rusa armeo rigardis lin kvazaŭ vilaĝanon. La malmultaj vortoj, kiujn li lernis el la hungara lingvo, abunde sufiĉis por liaj bezonoj.

Iun tagon kun du hungaraj viroj li iris al la arbaro haki arbon por rekon-

struo de disbombita domo. Vespere la hungaroj revenis sen li, kaj la sekvan matenon preskaŭ la tuta vilaĝo kuniris kun ili por alporti lian kadavron, kiun abrupte falinta dikega kverko dispremis nerekonebla. La pastro unue ne volis fari la entombigan ceremonion, dirante, ke verŝajne li estis sendiulo, kaj eĉ se ne, certe li ne estis romkatolika, sed la minaca mieno de la vilaĝanoj ŝanĝis lian sintenon kaj Vasiliĵ ricevis malofte viditan belan entombigon.

—oOo—

Kelkajn monatojn post lia morto oni starigis en la vilaĝa tombejo malgrandan monumenton memore al la rusaj soldatoj, mortintaj ĉirkaŭ la vilaĝo. La aŭtoritatoj longe meditis, kion fari pri Vasiliĵ, fine oni decidis ne transporti liajn restaĵojn al la komuna tombo, argumentante, ke li estis dizertulo, kiun certe atendus severa puno, se li vivus ankoraŭ. Lia korpo do restis plu sub la simpla lignokruco, ĉarpentita el la kverko, kiu mortigis lin en tiu nebula, aŭtuna posttagmezo.

La ŝtono de la monumento fiere spitas la froston kaj la pluvon, la forpasintaj dudek ok vintroj flugis super ĝi sen spuroj. Nur la lignokruco estas jam tre kaduka, oni devus pretigi novan. Tion neniu faras, sed la unuaj freŝaj floroj ĉiujare aperas sur la tombo de Vasiliĵ.

Kaŝvorto: *Judit '68*

CINDRULINO

La dek du sonorilbatoj aŭdiĝis dum Cindrulino dancis kun la eleganta kronprinco.

Noktomeze.

Tuj ŝia mirinda robo transformiĝos en ĉifonon; ŝia perfekta hararanĝo fariĝos senordaj bukloj.

Kaj Cindrulino fuĝis.

En la manoj de l' kronprinco restis kristalŝuo. Kiu taŭgis al li por trakuri la regnon kaj provi ĝin sur la piedoj de ĉiuj knabinoj. La enamiĝinta kronprinco diligente serĉis la mastrinon de l' kristalŝuo. Li trovis ŝin —malpura kaj kun distaŭzita hararo— frotanta la malnovan kuirĉambron de la duonpatrino. Tiam, konstatinte ke ŝi estas la mastrino de l' kristalŝuo, la prirevata virino, prenis ŝin je la mano, revenis kun ŝi en la palacon kaj, prezentante ŝin al la reĝino, diris:

—Viaj zorgoj estas finitaj, patrino. Mi ĵus trovis idealan servistinon.

ERGOTO DE BONAERO

PASTRO JOSE M.^a CLARAMUNT, EN MEKSIKIO

Por kiuj jam de antaŭ pluraj jaroj partoprenas la Hispanajn Kongresojn de Esperanto, la ĉijara kongreso estis iom melankolia.

Nia konstante aganta samideano Pastro José M.^a Claramunt Sch. P. foriras de ni pro translokiĝo al Meksikio. Kiam dum la inaŭgura solenaĵo li eldiris sian adiaŭan paroladeton, en la koroj de la ĉeestantoj miksiĝis danko kaj melankolio. Danko, pro lia ĉiam afabla sinteno kaj samideaneco, lia konstanta partopreno kaj kunlaboro en ĉiuj niaj aranĝoj... melankolio pro lia foresto.

Pastro José M.^a Claramunt apartenas al la ordeno de Piaj Lernejoj; laborante en Villanueva y Geltrú (Barcelona) li eklernis Esperanton kaj tuj li fondis tre vigan Grupon ĉe Biblioteko Balaguer. De antaŭ kelkaj jaroj li estis translokita al Calella de la Costa, ankaŭ en provinco Barcelona, kie li laboris kiel Rektoro de la Piaj Lernejoj kaj kie li ankaŭ fondis Esperanto-Grupon, kies prezidanto li estis. En Calella li kontaktiĝis kun Sro. Félix de Valoix, malnova esperantisto kaj tuj ili organizis kaj klarigis kursojn de Esperanto, kiuj kulminis per la okazigo de la Oficiala Postkongreso de la 26.^a IFEF-Kongreso en Calella. Ankaŭ en Villanueva y Geltrú, kiam Pastro Claramunt estis prezidanto de la Esperanto-Grupo, la tieaj esperantistoj organizis la 6-an Barcelona-Provincan Esperantistan Renkontiĝon.

Nun la esperantistoj de la provinco Barcelona, deziris inde adiaŭi sian elstaran samideanon. Unue estis la Grupo de Villanueva y Geltrú, kiu omaĝis lin per adiaŭa frata vespermanĝo en centra hotelo de tiu bela, industria urbo; dum ĝi, la gesamideanoj kaj kelkaj geamikoj donacis al P. Claramunt belan memoraĵon.

Kelkajn tagojn poste estis la aktivaj gesamideanoj de Calella, kiuj adiaŭis lin, ankaŭ per frata vespermanĝo en "Restoracio Pilar" apud la strando.

Fine, la 17-an de aŭgusto, gesamideanoj, ne nur de la provinco Barcelona sed de Katalunujo, kunvenis en "Restoracio Pirineos" de Barcelona, en frata vespermanĝo omaĝa. Je la fino, alparolis al la ĉeestantoj, reprezentantoj de diversaj Grupoj kaj oni legis adiaŭajn leterojn kaj telegramojn de pluraj samideanoj, kiuj ne povis ĉeesti. P. Claramunt ricevis plurajn donacojn kiel memoraĵojn. Fine, P. Claramunt per adiaŭaj vortoj esprimis sian dankon kaj promesis plu laboradi por Esperanto en sia nova loĝlando.

Kiam ĉi tiuj linioj aperos en BOLETIN, li jam estos en Meksikio. La Hispana Esperanto-Movado jam estos perdinta unu el siaj plej valoraj aktiviloj nuntempaj, sed ni estas certaj, ke la Movado en Meksikio gajnos lin.

Plenan sukceson en via laboro kaj plej korajn saluton kaj bondezirojn.

Red.

Jen nova adreso de P. José M.^a Claramunt, Apartado Postal 78-051, MEXICO 14 D.F.

DONATIVOS PARA BOLETIN - 1974

	<i>Pesetas</i>
<i>Suma anterior</i>	5.825,—
Juan Oliveras (Barcelona)	70,—
Vicente Tarín (Cheste)	25,—
Restituto Alberó (Burjasot)	40,—
Maurice Henry (Francia)	130,—
Esperanto-Klubo Payá (Mislata)	1.420,—
Pilar, 10; Josefa, 10; Delfina, 10; Pepica, 10; Amparito, 10; Lolfín, 10; E. González, 10; L. García, 10; Amanda, 10; María, 10; Ana M. ^a , 10; Margarita, 10; Pilarín, 10; Adelita, 10; Rosita, 10; Vicentita, 10; Car- men, 10; Peña, 10; Juanita, 10; E. Collado, 10; Celestina, 10; Reme-	

dios, 10; Susi, 10; Julio, 25; Bau-
tista, 25; Catalá, 25; J. Castelló, 50;
Ramonet, 10; Forés (elec.), 50; Ma-
nolín (elec.), 25; Félix, 100; Roberto,
100; Giménez, 50; Joel, 50; Porta,
25; Maroto, 25; Modesto, 25; Forés,
50; Felipe, 15; Blasco, 25; Ruz, 25;
Ballester, 25; Alberó, 25; Alcantari-
lla, 25; Lozano, 25; Alapont, 25;
Mateu, 50; Amador, 25; Juanito, 25;
Jesús, 25; Vicente, 25; Juárez, 15;
Párraga, 25; Faz, 25; Leopoldo, 25;
Deveses, 25; Alfredo, 25; Isafas, 25;
Hilario, 25; Ruiz, 25.

Total 7.510,—

ESPERANTO EN LA INTERNACIA SPECIMEN-FOIRO DE BILBAO

Ankaŭ ĉi-jare, la Grupo Esperantista prezentis budon en la Internacia Specimen-Foiro de Bilbao. Multe pli bone lokita ol tiu de la pasinta jaro, ĝi vekis pro sia alloga aspekto, la intereson de la ĉeestantaro.

Estus nepardonebla fanfaronajo, se ni asertus ke multaj personoj, alparolis nin rilate al Esperanto, verdire ni estis kiuj "kaptis la klientojn"; ĉiuj, kiuj haltis, por rigardi nian ekspoziciitan materialon, havis apude post nelonge, esperantistan deĵoranton, kiu klarigis al ili la celon de Esperanto, la utilecon de la lingvo, kaj funkciadon de la Movado.

Por multaj personoj nia ĉeesto tie, estis vera surprizo. Ili neniam aŭdis paroli pri Esperanto, aliaj, la plej granda parto el la publiko, esprimis varman simpatian al la ideo. Ofte, preterpasantaj gepatroj parolis al siaj gefiloj jene: "Ĉi tio estas Esperanto, la lingvo, kiun ĉiuj devus paroli ekde la lernejo".

Sed, kvankam tiu simpatio varmigis niajn korojn, ni rimarkis, ke tiuj, kiuj parolis tiel, atendas la triumfon de Esperanto, por poste lerni ĝin.

La gestudentoj pli sincere agnoskas, ke la ideo estas grandioza, sed ili preferas studi anglan aŭ francan lingvon, kiuj donos al ili la eblecon atingi bone pagitan postenon.

Ekzistas ankaŭ ali-specaj homoj, kiuj montras indiferecon, kaj aliaj, la skeptikuloj, kiuj neas la taŭgecon de Esperanto. Ili rigardis nin moke, kvazaŭ ni estus alvenintaj el alia planedo, do, por ni estis vera plezuro polemiki, ĉar ju pli forta kaj obstina estis la kontraŭulo, des pli ĝinda estis la venko de niaj argumentoj.

La inaŭguro de la Foiro, okazis la 22-an de Junio, kaj daŭris ĝis la 1-a de Julio. En la budo ni ekspoziciis librojn, revuojn, prospektojn, kaj ni disdonis kelkajn milojn da propagandaj flugfolioj.

Ni esperas ke nia partopreno longe daŭros, ĉar ni havas favorajn apogantojn kiuj ĝentile helpas nin.

Josefo



La puĉo okazinta en la kongreso de Hamburgo kaj kondukinta al la ŝanĝo de la estraro de UEA ekmontras konsekvencojn tiel eksterordinare gravajn, ke eĉ la ekzisto mem de la Asocio ŝajnas endanĝerigita.

Ne eblas fari ankoraŭ ampleksan komenton surbaze de la raportoj kaj opinioj de la revuoj de la Movado, ĉar ili alvenis ĝis nun en tre malgranda nombro, do ni devos atendi ĝis la venonta(j) numero(j) de BOLETIN. Tamen en HEROLDO DE ESPERANTO, n.º 11-12, 1 septembro 1974, troviĝas jam pripensiga materialo.

Por ekzemplo: *"La veraj motivoj de la foriro de prof. Lapenna estas multe pli simplaj. Dum ĉ. 25 jaroj li gvidis UEA kun sindediĉo, kiu estas admirata de ĉiuj. La Movado estas unuanime kaj sincere dankema al li, sed ĝi opinias, ke post 25 jaroj venis la tempo por ŝanĝoj"*.

La malamikoj de d-ro Lapenna vere riproĉas al li nenion, aparte de tio, ke post 25 jaroj venis la tempo por ŝanĝoj! La argumento estas absolute miriga, eĉ konsterna. Se vi, kara leganto, havas edzinon fidelan, laboreman, ĉiam zorgantan pri la familio kaj pri la rekta mastrumado de la hejmo, vi devas ŝin ĵeti senkonsidere al la strato, se ŝi jam kunvivis kun vi pli ol 25 jarojn... ĉar venis la tempo ŝanĝi ŝin por alia pli juna!

Mi ne scias, ĉu la anonima aŭtoro de la artikoleto pensas, ke la esperantistoj konsistas el facile trompeblaj kretenoj. Ankoraŭ en oktobro de 1960, d-ro Lapenna estis, ne prezidanto de UEA, sed ĝenerala sekretario. Se oni objektus, ke tamen li jam "gvidis" la aferojn de UEA en tia funkcio, ni devus same pensi, ke UEA-n gvidas nun, ne d-ro Tonkin, sed la aktuala ĝenerala sekretario s-ro Wensing. Nu, en oktobro de 1960, la nuna estrarano s-ro Woessink estis jam estrarano pri financoj. Tamen, al s-ro Woessink oni ne aplikis la teorion de HEROLDO, ke venis tempo por ŝanĝoj! Ŝajnas, ke ĝin oni devas apliki nek al edzinoj, nek al s-ro Woessink, sed nur kaj ekskluzive al d-ro Lapenna!

En la sama numero de HEROLDO DE ESPERANTO, la nuna estrarano de UEA, d-ro P. Denoël deklaras: *Polemikoj evidente devos ĉesi.*

Ĉu anonco, averto kaj avizo de la "demokratia" spirito de la nova estraro de UEA?

De sia flanko, s-ro Woessink deklaras: *"Mi fidas al la helpo —ankaŭ financa— de la membroj de UEA, kiuj malgraŭ ĉio restos fidelaj..."*.

Jen miriga konfeso: kion signifas tiu malgraŭ ĉio? Ĉu lia subkonscio perfidis lin? Ĉar, se la membroj de UEA, laŭ la sama HEROLDO, *"elektis per plimulto, kiu —pro la cirkonstancoj— povas esti nomita plebiscito"*, kiel oni devus kompreni tiun rivelan malgraŭ ĉio en la kunteksto de s-ro Woessink? Ĉu ne estus pli logike deklari, ke... "ili certe restos fidelaj, se konsideri, ke ili per grandega plimulto staras ĉe nia flanko"?

S-ro Woessink aldonas: *"mi jam kalkulas pri novaj membroj, kiu (re) aliĝos"*. Kaj pri la membroj, kiuj ekŝiĝis, ekŝiĝas kaj ekŝiĝos, ĉu vi ne kalkulas, s-ro Woessink? La individuaj membroj de la okcidentaj pagipovaj landoj formas la financan, esencan bazon de ekzisto de UEA, kaj ili klare kaj definitive voĉdonis por d-ro Lapenna. Ĉu UEA vivtenos sin per la individuaj membroj de UEA en la komunisma mondo, membroj kies pliparto ŝuldas sian UEA-anecon al la malavara mona helpo de la esperantistoj de la okcidentaj landoj?

Ĉu fine estos fakto la malintegriĝo de UEA, kiel asertis d-ro Lapenna, aŭ la manifestiĝo de la financa helpo de la membroj de UEA, kiuj malgraŭ ĉio restos fidelaj, laŭ la optimisma proklamo de s-ro Woessink?

La tempo diros la lastan vorton. Sed, se mi estus en la loko de s-ro Woessink, mi ne farus al mi multajn iluziojn.

Antaŭ ol okazis la puĉo de Hamburgo, prof. Waringhien skribis en LA FRANCA ESPERANTISTO, julio-aŭgusto 1974, n.º 287: *"Se ni konsideras la nunan staton de la aferoj, ni vidas unuflanke homon de potencia agforto kaj elstara inteligento, al kies iniciativo ni ŝuldas la prosperon relativan, sed neneĝblan de UEA, kaj la rangon, kiun nia Asocio ĝuas ĉe Unesko kaj ĝenerale sur la internacia kampo: homon, kiu ĉiam demokrate submetis sin al la decidoj de la Asocio; homon, fine, de nekontestebly honesteco kaj lojaleco. Sur la alia flanko ni vidas senkoheran koalicion de sinceraj maldekstremuloj, de kaŝitaj reakciuloj, de ruzaĵ ambiciuloj kaj de simplaj elmontremuloj... Tia koalicio, se ĝi venkus, tuj diserigus en inter si batalantajn grupetojn..."*.

Sajnas al mi, ke la analizo kaj la prognozo de d-ro Waringhien estas la plej realaj, la plej faktaj kaj la plej konformaj al la situacio. Gulivero foriris, kaj la nanoj komencas danci laŭ la takto de ia bulgara farandolo kun ritmoj de pola-bohema polko. Kia amuza spektaklo, se ĉio atingita, eĉ se malmulte, ne riskus nehelpeble disfali!

—oOo—

EN HUNGARA VIVO, 3, 1974, nia bona poeto Edwin de Kock plendas: “Ni bagateligas nian originalan versarton per troa emfazo de sensignifaj poemtradukoj. Generale la rezultoj de tiu teda industrio estas kvalite substandarda (tiel!). Krome, mi konfesu, ke la tradukisma manio en certaj kazoj havis tre malbonan influon sur nia originala verkado. Tro multaj el niaj propre Esperantaj poemoj aspektas same kunsraŭbitaj kaj senvivaj metrikaĵoj... Parte kiel rezulto de tio niaj poemoj ne sufiĉe strabas plene ekspluati la mirindajn latentojn de Esperanto... Niajn aŭtorojn tre malhelpas ankaŭ la facila laŭdado de niaj tiel nomataj kritikistoj, kiuj devus fariĝi multe pli severaj... kaj fi-dindaj. Kun kelkaj belaj esceptoj literatura kritiko, meritanta tiun nomon, ĝis nun apenaŭ ekzistas inter ni”.

Mi samopinias kun de Kock ĝis la lasta punkto, kaj nur ne komprenas, kial la tradukoj poeziaj povas iel obstakli la liberan manifestiĝon de la originalaj poetoj. Ĉu “La infana raso” de Auld ne eldoniĝis kaj furoris malgraŭ la ekzisto de tiom da fuŝaj tradukoj?

La vero estas, ke niaj originalaj poetoj, kiel cetera okazas en la diversaj naciaj lingvoj, ĝenerale verkas, ne por la ordinara homo, eĉ se li estas sufiĉe klera, sed por aliaj poetoj, kaj por areto da kritikistoj, eruditoj kaj snoboj; sekve, la poezio mortas per si mem pro manko de publiko, des pli en nia Movado, kie la legemuloj, ne de ajna poezio, sed eĉ de ajna prozo, povus komforte sidi kune en tri-vagona trajno.

En la lastaj belartaj konkursoj de UEA la du unuaj premioj de ĉiu branĉo —originala kaj tradukita poezio, originala prozo kaj originala dramo— estis nealjuĝitaj. Ĉu kulpas la tradukoj, la originaloj, la poetoj, la prozistoj aŭ la publiko? Jen temo por primedito.

—oOo—

STARTO, 3-4, 1974, publikigas la jenan noton: *Feliĉa edziniĝo: Japanino Tamiko Kaŭakami kaj norvego Asbjorn Nielsen estas internacia paro, kiu estigis per Esperanto. La edzo laboras kiel bibliotekisto en Oslo, la edzino ankoraŭ studas. Si skribis al ni: “Nun mi ĝuas la vivon sen hejmaj laboroj, ĉar li volonte faras ĉion: aĉetadon, kuiradon, lavadon, purigadon, gladadon, kudradon, ordigon ktp.”*

Ni gratulas la simpatian japaninon Kaŭakami, kies aventurojn tra Afriko ni komentis antaŭ nelonge. Sed mi estas tute konfuzita: kion signifas tiu “ktp”? Kion plian povus fari s-ro Nielsen en la ‘fako’ de la hejma mastrumado? Fraŭlinoj Esperantaj —kaj esperantaj— de la tuta mondo: korespondu kun fraŭloj norvegaj! Post via edziniĝo al ili, vi estos plene regalataj, eĉ per tiu mistera ktp! Ne danku min pro la sciigo: mi nur deziras vian feliĉon.

—oOo—

Estas sciante, ke la revuoj kaj ceteraj informaj organoj de la komunisma mondo devas sisteme defendi la propran reĝimon, kaj, krome, devas ataki ĝenerale la kapitalisman sistemon kaj speciale kelke da landoj kaj registaroj. Se ili ne farus tion, komprenable la revuoj ne aperus. Ne strange do, ke en la hungara ESZPERANTO MAGAZIN, agosto 1974, oni legas:

“La tri Paŭloj. Sub ĉi tiu titolo la gazeto de la hispanaj esperantistoj aperigas tutpaĝan artikolon pri Picasso, Neruda kaj Casals, “tri mondfamaj artistoj de la hispana familio. Respektoplene ni klinas la kapon antaŭ la tri malaperintaj kolosoj” —jes, leginte tiujn apoteozajn frazojn diritajn irans la Pireneoj pri la “tri Paŭloj”, ni ĝoje konstatas, ke la suno ankaŭ tie estas jam suprengrimanta”.

Dankon pro la mencio, hungaraj kamaradoj. Evidentas, ke Hispanujo ne atingis ankoraŭ la superan kategorion de fermita paradizo, kaj ĉi tie ekzistas plu la netolerebla kaj pure faŝisma kutimo permesi ajnan hispanon libere vojaĝi ien ajn sur la vastan mondon kaj sub la sunon de lia plaĉo.

—oOo—

Kaj ĝis la proksima revu-rikolto, kun plej koraj salutoj,

Fernando de Diego

ACUERDOS DE LA JUNTA GENERAL DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE
ESPERANTO Y RESOLUCIONES DEL XXXIV CONGRESO ESPAÑOL
DE ESPERANTO

ACUERDOS:

1. La Junta General de la Federación Española de Esperanto, en su sesión del 22 de julio de 1974, acordó elevar las cuotas de miembro de la Federación en sus distintas categorías, habiendo quedado fijadas como sigue: Miembro abonado, 250 pesetas; Miembro protector, 400 pesetas; Miembro numerario, 100 pesetas. Estas cotizaciones son anuales. El miembro vitalicio seguirá cotizando 5.000 pesetas en una sola aportación.
2. Ratificar como Secretario de H.E.F. a D. José María González Aboín.
3. Intensificar el uso del idioma Esperanto en todos los actos de los Congresos.
4. Asimismo se acordó aceptar la propuesta de los esperantistas de Lérica para celebrar el XXXV Congreso Español de Esperanto en dicha ciudad.

RESOLUCIONES:

1. Solicitar del Ministerio de Educación y Ciencia que se organicen una vez al año cursos de Esperanto durante el período de vacaciones para los profesores de los distintos niveles de enseñanza, con ayuda económica para su asistencia a los mismos.
2. Solicitar, asimismo, del Ministerio de Educación y Ciencia que actualice y patrocine las disposiciones vigentes en relación a la enseñanza del Esperanto en los centros de Educación General Básica.
3. Enviar telegramas de saludo con ocasión del XXXIV Congreso Español de Esperanto a sus Excelencias el Jefe del Estado y el Príncipe de España.

ELDONA FAKO DE H.E.F.

Je la dispono de niaj membroj kaj amikoj ni havas jenan liston da esperantajoj:

Mendu ilin tuj:

Esperantaj insignoj (rondaj kaj stelformaj, pinglaj kaj butonaj) .	20,— ptoj.
Esperantaj insignoj (Airon-fix) rondaj, ovalaj kaj stelformaj ...	15,— "
Dok. CED/7 "Bazaj faktoj..." de Dro. Lapenna (hispanlingve "Hechos fundamentales...")	10,— "
Dok. CED, A/II/I "La lingva problemo en la internaciaj rilatoj" de Dro. Lapenna (hispanlingve "El problema lingüístico...") .	15,— "
"Eterneco" (Navarra Legendo) de A. Núñez Dubús	10,— "
"Filozofio de fantomo", W. F. Flórez, trad. L. Hernández	30,— "
"La Lando de Alvargonzález", A. Machado, trad. F. de Diego ...	50,— "
"Kun sopira koro", G. A. Bécquer —Rimas—, trad. F. de Diego.	120,— "
"Sango kaj sablo", V. Blasco Ibáñez, trad. R. de Salas	90,— "
"La Malprudenta scivolulo", M. de Cervantes, trad. L. Hernández.	50,— "

Boletín normal: 30 ptoj. Boletín extraordinario: 50 ptoj.

En la libroj ni donas rabaton 10 % por mendoj de minimume kvin (5) ekzempleroj de sama titolo.

En insignoj ni donas rabaton 10 % por minimuma mendo de dudek (20) insignoj kaj 20 % por minimuma mendo de kvindek (50) insignoj.

Mendoj kaj pagoj ĉe: Inés Gastón. Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha. ZARAGOZA.

Ni legis por vi...

NI KAJ GI (*Eseoj pri religio kaj arto*) de Gaston Waringhien. Eldonis J. Régulo Pérez (Stafeto). La Laguna, Tenerifo, 1972, 16 × 22 cm., 348 paĝoj, broŝurita. Prezo: 350 ptoj.

Jen epokfara libro en nia originala literaturo. Ĉu mi diru jam dekomence ke en sia speco ĝi estas la plej grava ĝis nun eldonita en Esperanto kaj unu el la malmultaj, kiuj meritas tradukon en la naciajn lingvojn?

La unua kaj pli elstara parto de la verko estas profunda analizo de ekzegezisto kiu, per vasta erudicio, klopodas prilumi la instinktan fundamenton de la homo por montri al ni, kiel kaj kial fontas la religia sento el regionoj de nia naturo apenaŭ konataj. En la ĉapitroj *Pilgrimo al la fontoj*, *La magio hodiaŭ kaj hieraŭ*, *Iliaj bestaj moŝtoj*, *Tabuoj*, s-ro Waringhien studas la praajn fortojn, kiuj ankoraŭ regas mistere nian koron kaj ŝancelas nian racion. Tuj poste, la aŭtoro faras sisteman kaj metoda analizon de la kristanismo, de la Biblio, de la figuro de Jesuo, de diversaj aspektoj de la liturgio, de Sankta Maria kaj ties kulto... kaj finas, kvazaŭ resume kaj konklude, per la superbaj ĉapitroj *La veto* (aludo al la fama argumento de Pascal) kaj *Pensoj el hospitalo*.

S-ro Waringhien estas liberpensulo, kaj la religion li ekzamenas kaj malmuntas de sia persona vidpunkto. Sed li mem avertas jam en la antaŭparolo: "Al tiuj el miaj legantoj, kiuj apartenas al unu el la diversaj eklezioj, mi ne faros la ofendon supozi, ke miaj simplaj opinioj povus naski ĉe ili dubojn; sed mi tre bedaŭrus, se ili vidus en tiuj eseoj atakon kontraŭ la religio, kiun ili amas kaj praktikas. Verdire tiun parton de la libro ne estas destinita al ili... kaj estus pli bone por ili, same kiel por mi, se ili ĝin tute ne legus".

Sed estas evidente, ke la plej raciaj kaj logikaj argumentoj ne povas ŝanceli ies religian kredon: la religia sento, same kiel la sento poezia, apartenas al la instinkta strukturo de nia memo, do estas nmovebla, se oni ĝin havas. Tion agnoskas Waringhien, kiam li diras: "Mi estis naskita de katolikaj gepatroj kaj edukita en la kristana religio. Ĝis mia 17-a jaro mi penis instali min en ĝia ideologio, intimiĝi kun ĝiaj ritroj kaj dogmoj kaj konformi

mian konduton al ĝiaj idealoj. Sed fine mi konstatis, ke tiuj penoj estas vanaj: absolute mankis al mi la religia instinkto..." (paĝo 10). Kaj li aldonas: "Almenaŭ... mi konservis ĉiam vivan interesiĝon pri la religioj kaj ilia historio kaj sinceran respekton por tiuj altaj inspiroj, kiuj provis alporti al la homaro, al la kompatinda homaro, iom da konsolo kaj de paco".

La libro do ne estas ia vulgara pamphleto kontraŭklerikala, sed honesta provo ekpliki per impona aparato erudicia, kiel probable kreigi la dogmoj, doktrinoj kaj apoteozoj de la religio.

La dua parto de la libro, pli mallonga, temas pri arto: kiel la arto eble originas en la religia sento kaj en la seksa instinkto, kaj kiel en nia moderna epoko la arto, respegulante la haoson de nia civilizo ŝajnas degeneri kaj steriliĝi ĉar, krom tio, ke ĝi rifuzas plu uzi la tradiciajn teknikojn, havas nenian signifan aŭ koheran mesaĝon por transdoni al la nunaj generacioj.

Kiel enigma sfinkso, Arkitekturaj disvagaĵoj, La nudo, La ĝardeno de Francujo, Olda, pentrinda Nederlando kaj Kien la arto? estas la diversaj eroj, ĉarmaj kaj pensigaj, de eseo pri la origino, disvolvo kaj tendencoj de la arto.

Sed en ĉi tiu trezora libro, alian gravan aspekton la recenzistoj neklariĝe preteris. Mi aludas ties poezian enhavon. Por la amantoj de poezio, *Ni kaj Gi* konsistigas veran regalon, specon de internacia antologio. La traduka virtuozezo de s-ro Waringhien garnas la libron per brilaj versioj de pecoj de Karlo Péguy, Alfredo de Musset, Baudelaire, Paulo Claudel, Goethe, A. de Vigny, Oscar Wilde, Leconte de Lisle, Teofilo Gautier, J. M. de Heredia, Vergilio, Lukrecio, Verlaine, Leonido el Tarento, Omar Hajjam, Viktoro Hugo, Petro de Ronsardo, Paulo Valéry, Heziodo, Joakimo du Bellay, Kristoforo Plantin, Gerardo de Nerval, Apollinaire...

Superfluas paroli pri la lingva majstreco de s-ro Waringhien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto. *Ni kaj Gi* denove konfirmas lin kiel unuarangan stiliston, gramatikiston kaj tradukiston. Notindas lia uzo de "l'o", kiu egalas al la neŭtra artikolo hispana "lo"; por ekzemplo, *l'o dia = lo divino*; kaj eble pro influo de la franca, s-ro Waringhien uzas tro larĝe *tiu(j)* en okazoj kie, almenaŭ por eviti mono-

tonecon, taŭgus la artikolo, aŭ *tia(j)*, aŭ, en pli precizaj kazoj, *ĉi tiu(j)*.

Resume: libro elstara de aŭtoro eminenta. Bedaŭrinde, ke Esperantujo ne produktas pli da ili ambaŭ!

F. de Diego

INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO EN NAU LINGVOJ, de F. Munniksma kaj grupo de kunlaborantoj. Eldonita sub auspicio de Instituto por Esperanto en Komerco, Nederlando, Kluwer Deventer, 1974, 15 × 22 cm., 536 paĝoj, tolbindita. Prezo: 1.275 ptoj.

Mi sentas profundan kontenton, kiam mi povas recenzi libron, kies enhavo kaj lingvo posedas la sufiĉan dignon. Kiel *Mi kaj Ĝi* en sia speco, ĉi tiu **KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO** meritas nur laŭdon kaj senrezarvan rekomendon pro sia serioza trakto de la koncerna fako.

Fak-vortarojn ni devus produkti antaŭ ĉio, se ni deziras, ke Esperanto trovi fortikan bazon por ekradiki en la diversaj sferoj de la vivo. Sed tiaj fak-vortaroj devus havi ĝisdatigitajn terminologiojn, esti kompilitaj de veraj specialistoj kaj reviziitaj de lingvaj kompetentuloj. Ŝajne tian kriterion oni aplikis al IKEV kun bonegaj rezultatoj.

Pli ol 2800 vortoj kaj esprimoj apartenantaj al la medio de la komerco kaj la ekonomiko estas difinitaj en la angla kaj Esperanto, kun ekvivalentoj en la germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala kaj sveda. Kompreneble, per tia vortoprovizo ne elĉerpigas la tuta terminologio —speciale vasta kaj kompleksa— de la komerco kaj ekonomiko (eĉ mankas kelkaj elementaj nocioj) sed nedube-

ble ĝi plenumos tre gravan funkcion, ne nur praktikan, sed ankaŭ propagandan.

Bedaŭrinde, ke en la vortaro rangas kiel ĉefa lingvo la angla; tuj post ĝi enviciĝas Esperanto, kiel ia speco de malriĉa parenco; sed eble la deziro krei la eblecon disvendi la libron en pli vasta merkato konsilis al la aŭtoroj tian aranĝon de la verko. Eble la metodo montrigos efika, kaj signos la solvon al la problemo eldoni Esperantan fak-vortaron sen financaj perdoj.

Gratulojn al s-ro Munniksma kaj ties kunlaborantoj pro vere merita kaj prestiĝodona verko!

F. de Diego

POR PLI EFIKA INFORMADO, de Ivo Lapenna. Eldonis UEA, Rotterdam, Nederlando, 1974, 16,5 × 22 cm., 22 paĝoj, broŝ. Prezo: 50 ptoj.

En plaĉ-aspekta, ilustrita broŝuro, s-ro Ivo Lapenna komunikas al ni siajn valorajn spertojn en la kampo de la informado. Car ni, esperantistoj, vole nevole estas samtempe propagandistoj de nia lingvo kaj de ties filozofio, al ni ĉiuj konvenas lerni la plej efikan kaj praktikan metodon "vendi nian varon".

Apenaŭ ni povus trovi ĉi-rilate pli bonan instruiston ol s-ran Lapenna, kies broŝuro estas riĉa mino da sugestoj kaj konsiloj. Juĝu mem laŭ ĉi tiuj kelkaj ĉapitroj de la enhavo: *Kiel redukti misprezentojn?*, *Kion eviti?*, *Lingvo kaj lingvo-projekto*, *Pri kio informadi?*, *Sekteco*, *Senerara nacia lingvo*, *Interpretado*, *Kiel aranĝi ekspozicion?*, *Konstanteco kaj kampanjoj...*

Por pli efika informado estas do "nepraĵo" por ni ĉiuj.

F. de Diego

SEKRETARIA RAPORTO PRI LA LABORO REALIGITA DUM LA PERIODO EKDE LA UNUA DE JULIO DE 1973 ĜIS LA TRIDEKA DE JUNIO DE 1974

La Estraro de H.E.F., kiel en aliaj okazoj dum la naciaj kongresoj de Esperanto, prezentas al la Generala Kunveno de H.E.F. la sekretarian raporton. Mi unuafoje devas tion fari kaj mi klopodos montri al vi la rezulton de la laboro de unu jaro.

Laŭ statutoj ses membroj de la Estraro devis lasi sian postenon aŭ esti reelektitaj. Plu oficas Sro. Figuerola Auque kaj Sro. Flores Martín. Sro. Gómez Martín, Sro. González Aboín kaj Sro. Figuerola Palomo, Héctor, okupis la postenojn de Sro. Ibáñez Crespo, Sro. Figuerola Palomo, Manuel kaj Sro. González Aboín respective. Sro. Ortiz Gratal, el Zaragoza, estis unuanime reelektita.

Dum la pasinta akademia periodo oni organizis du elementajn kursojn de Esperanto en la Centra Sekretariejo de H.E.F. Ankaŭ la plimulto de la lokaj, provincaj aŭ fakaj societoj rilataj al la Federacio faris kursojn. Ni devas emfazi la gravecon de tiu afero ĉar se oni ne diskonigas la scion de Esperanto ĉiu alia laboro estos vana.

La prelegoj aranĝitaj en tiu tempo estis parolataj de Sro. Rodríguez L. Silva, Sro. Prytz el Norvegujo, Sro. Figuerola Auque kaj Sro. Neergaard el Danlando, Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

Rilate la informadon oni substrekas ke la informa servo de H.E.F. gvidata de la Prezidanto, dissendas regulan monatcirkuleron pri Esperanto-disvolvigo por gazetaro, radio kaj televido. La hispanaj radioj dediĉis kelkajn horojn al la propagando de Esperanto kaj la televido proksimume unu horon, ankaŭ en ĵurnaloj de multaj urboj aperis ofte sciigoj pri nia lingvo kaj movado.

Oni multe laboris en la centra oficejo por la eldono de la adresaro, jam estas preta tajpita ekzemplero, sed bedaŭrinde la manko de mono ne faris ebla ankoraŭ ĝian presadon.

Nun ni rigardu la aktivaĵojn kiujn realigis la diversaj sekcioj kaj servoj de la Federacio.

BOLATIN: Nia revuo, oficiala organo de H.E.F., efike regata de Fino. Inés Gastón, aperis ĉiam regule kiel en la pasintaj jaroj. Por multaj esperantistoj kiuj loĝas en vilaĝoj ĝi estas eble la nura komunikilo kaj por ĉiuj grava helpo.

FERVOJISTA SEKCIO: Dum la pasinta jaro la plej grava evento estis sendube la XXVI^a I.F.E.F. Kongreso de Esperanto en Tarragona. Pli ol 700 kongresanoj el 18 landoj partoprenis ĝin. La festoprogramo prezentita al la gastoj estis tre riĉa kaj la laborkunsidoj, forumo kaj prelegoj tre interesaj ne nur por la fervojistoj sed ankaŭ por ĉiu esperantisto. La Postkongreso okazis en Calella de la Costa.

JUNULARA SEKCIO: La klopodo por pligrandigi la nombron de la anoj havis grandan sukceson; la nuna granda nombro de junuloj estas la plej bona espero por la estonteco. En ĉiuj kongresoj universalaj, naciaj, fakaj aŭ renkontiĝoj oni povas admiri ilian entuziasmon kaj gajecon.

TURISMA SEKCIO: Dum ĉi tiu jaro, la sekcio realigis jenajn aranĝojn: Komuna flugvojaĝo al Beograd kaj Atenas okaze de la 58.^a Universala Kongreso de Esperanto kaj ties Oficiala Postkongreso. Ekskurso al Biarritz por partopreni en la VI-a Franca-Hispana Esperantista Renkontiĝo. Ambaŭ ekskursoj bone sukcesis, same kiel bone sukcesis la ĉijara kurso de Esperanto organizita en Centro Cultural Medina, en Zaragoza.

La laboro pri informado kaj akcepto de eksterlandaj samideanoj estis tre intensa.

HISPANA ESPERANTA AŬROPO: Oni plu disvastigadis la internacian lingvon inter la hispanaj blinduloj, per kursoj aŭ per la fonoteka servo.

ELDONA FAKO: La ĉefa verko eldonita ĉi jare estis "La lingva problemo en la internaciaj rilatoj" en hispana teksto, tradukita de Fino. Inés Gastón.

FONDUSO ESPERANTO: La Patronaro disdonis la premiojn de 1973, kaj anoncis la novajn premiojn por la nuna jaro, nome: "Fundación ESPERANTO", "Francisco Máñez" kaj "Casanovas-Ferrándiz".

LIBROSERVO: Daŭrigis plu la vendado de libroj esperantaj proksimume kiel en la pasinta jaro; ni esperu ke ĉesos kelkaj malfacilaĵoj kaj ke ĝi baldaŭ reakiro sian antaŭan gravecon.

Fine mi deziras danki la helpon de tiuj kiuj kunlaboris, kaj la bonvolemon de multaj samideanoj pro la eblaj mankoj.

Tutkorajn salutojn al ĉiuj.

José M.^o González Aboín

Sekretario de Hispana Esperanto-Federacio



LUDWIG VAN BEETHOVEN

Himno de la Europa Unueco

allegro




- 1) Tuj la por-doĵ mal-fer-mi-ĝos
- 2) Man-en-ma-ne tra la moy-do



del' e-ter-na, ho-mar-am',
Ho-ma-ra-noĵ i-ras kun',




Kaj profund' en-ra-di-ki-ĝos, l'ar-bo sank-ta de la pac'.
Kaj es-ti-ĝos lu-ma rog-do, bri-la, he-la ki-el sun'.



Nia ce-lo lo i-de-a la ni-a-sonĝo ni-a rev' ligg-
La ra-di-oĵ lu-mi-gan-taj de la-Espe-rantist'ar'es



-vo ja, u-ni-ver-sa-liz-
-tos ĉi-am kun-por-tan-taj



por tut-moy-da pa-ca reg'.
U-nu-i-gon al Ho-mar'.



Muziko: L. van Beethoven.
Teksto: F. de Valois.